

THE JOURNAL OF CHINESE  
CULTURE

中國文化

1986





金螺仙子



*Narciso en litorino-konko*

Foto de GJANG GINGJU



## Enhavo

Ĉinaj urboj en disvolviĝo . . . . .	2
Tjanĝin batalas kontraŭ neinfektaj malsanoj . . . . .	6
La rubanda parko de Ŝenjang . . . . .	10
Kial kaj kiel mi volas esplori la ĉinan Esperanto-movadon . . . . .	23
POR KOMENCANTOJ: "Kuracisto" en vagonaro . . . . .	30
SUR NIA LIBROBRETO: Tri romanoj de István Nemere . . . . .	28
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	26
TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (20): Sur la tero de Guge-regno . . . . .	45
La origino de la ĉina civilizacio . . . . .	13
Ĉinaj vegetaraj pladoj . . . . .	66
Allogi birdojn — urĝa tasko . . . . .	18
ĈINA LITERATURO: Belaj mitoj kaj legendoj de la antikva Ĉinio . . . . .	39
Du antikvaj mitoj de Ĉinio . . . . .	41
Reĝo de ĉigong-o . . . . .	42
Ĉina antikva piedpilkado . . . . .	31
Pri kio pensas la geknaboj? . . . . .	58
Antikva ĉina arkitekturo . . . . .	33
Ponto de arta interŝanĝo kaj kunlaboro . . . . .	62
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Pri la kvin famaj montoj de Ĉinio . . . . .	36
EL REALA VIVO DE ĈINIO: Virinoj de Huj'an . . . . .	52
AMUZO . . . . .	65
INTER NI: Du ĝenaj vortoj . . . . .	68
KURANTAĴ AFEROJ . . . . .	56, 61

SUR LA KOVRILO: Antikva pagodo en monto

Foto de **JIMING**

INTERNE DE LA KOVRILO: Narciso en litorinokonko

Foto de **ĜJANG ĜINGJU**

INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Trikolore glazurita leono

SUR LA DORSKOVRILO: Luna nokto (Ĉinstila pentraĵo)

de **SIN KEĈING**

JARABONTARIFO		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	8.00	US\$	10.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:		£	5.00	US\$	6.50



# Ĉinaj urboj en disvolviĝo

Ĉinio estis agrikultura lando malriĉa kaj postiĝinta. Subevoluis ankaŭ ĝiaj urboj kaj urba ekonomio. Post la naskiĝo de la nova Ĉinio en 1949 komenciĝis grandskala ekonomia konstruado. Ĉinio paŝon post paŝo fariĝas lando industria kaj rapide disvolviĝas la ĉinaj urboj kaj ilia konstruado.

## GRANDAJ KAJ MEZGRANDAJ URBOJ — KERNO DE LA URBA SISTEMO

En la unuaj jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio estis nur 116 urboj, ne inkluzive de tiuj en Taj'ŭan (same poste) en la tuta lando. Tiam, ĝenerale dirite, la urba skalo estis malgranda. La urboj plejparte estis malgrandaj kun malpli ol 200 000 loĝantoj. La skalo de la grandaj kaj mezgrandaj urboj estis malgranda. Kaj la procentaĵo de iliaj loĝantoj en la totala nombro de la lando estis malalta. Tiam estis nur 12 grandaj urboj, kies loĝantaro superis 500 000. La malekvilibro de ekonomia disvolviĝo kaj anormala industria dispozicio de la malnova Ĉinio decidis la neracian dislokiĝon de la urboj. Ili plejparte

*En loĝkvartalo*



situus ĉe la orientaj marbordaj provincoj, dum en la okcidentaj kaj nordaj landlimaj provincoj, kiuj konsistigis 70% de la totala teritorio de la lando, estis malpli ol 20 urboj. En 1949 la urba loĝantaro nombris nur 57 milionojn, t.e. 10% de la totala nombro de la loĝantoj en la tuta lando.

Je la fino de 1985 Ĉinio jam havis 324 urbojn. Laŭ statistiko pri neagrikulturaj loĝantoj, en Ĉinio estis 20 grandegaj urboj, kies loĝantaro superis milionon, 31 grandaj urboj, ĉiu kun 500 000-1 000 000 loĝantoj, 81 mezgrandaj urboj, ĉiu kun 200 000-500 000 loĝantoj kaj 192 malgrandaj urboj, ĉiu kun malpli ol 200 000 loĝantoj. La grandaj kaj mezgrandaj urboj jam konsistigas la ĉefan parton de la urba sistemo de Ĉinio hodiaŭ. Dank' al konstruado de novaj industriaj bazoj en la landinterno kaj la okcidentaj kaj nordaj landlimaj regionoj, aperis granda nombro da novaj urboj. Iom raciigis la urba dispozicio de Ĉinio. En 1983 la nombro de la urbaj loĝantoj de Ĉinio jam superis 300 milionojn, kiuj konsistigis 30% de la totala loĝantaro de Ĉinio.

## FUNDAMENTAJ INSTALAĴOJ DE URBOJ

La nivelon de urbo markas la urbaj akvo-provizo, akvodreno, stratoj, publika trafiko, gaso-provizo, koncentra varmoprovizo, media higieno, ĝardenoj kaj verdigo, brulego-prevento kaj aliaj. En la unuaj jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio la fundamentaj instalaĵoj de urboj estis simplaj kaj nekompletaj. Tiam nur en malmultaj urboj estis tubakva sistemo. La stratoj plejparte estis mallarĝaj malebenaj kaj pavimitaj per gruzoj. La strata balaado kaj rubokolektado estis plenumataj sole per simplaj instrumentoj. Pro multjara militado la plejparto de la antikvaj ĝardenoj estis difektita.

Dank' al la pli-ol-30-jara grandskala konstruado, la fundamentaj instalaĵoj de la urboj en la nova Ĉinio jam havas sian rudimentan skalon.





*Nova aŭtovoja trefkruciĝo*


Laŭ statistiko farita en 1984, 95% de la ĉinaj urboj havas tubakvajn instalaĵojn. En multaj grandaj kaj mezgrandaj urboj ĉiuj loĝantoj povis centprocente uzi kranakvon. En la urboj funkciis la subtera malpurakva sistemo. Multaj urboj havis traktejon de malpura akvo. La urbaj stratoj havis longon de sume 37 000 km., plejparto kun altklasa aŭ subaltklasa pavimo. La nombro de la novaj fortikaj pontoj en la urboj atingis pli ol 5 000. En 251 urboj estis publikaj trafikaj instalaĵoj kaj en pli ol 100 urboj gasprovizaj instalaĵoj. En multaj grandaj kaj mezgrandaj urboj de norda Ĉinio estis koncentra varmoproviza sistemo. 40% de la laboroj pri la media higieno estis farataj per maŝino. La totala areo de la ĝardenoj kaj gazonoj de la tuta lando superis 170 000 hektarojn. Aperis 800 urbaj parkoj nove konstruitaj aŭ rekonstruitaj. Nemalmultaj urboj estis verdigitaj je ĉ. 30%.

## **URBOJ — BAZO DE LA MODERNIGO**

La urba konstruado de la nova Ĉinio trapasis longan vojon en sia disvolviĝo. Ni prenu Ŝanhaj-

jon, la plej grandan urbon de Ĉinio, kiel ekzemplon. Nun ĝi estas urbo kun kompleta sistemo de industrioj, racia dispozicio de diversaj industriaj branĉoj kaj organike kombinitaj entreprenoj grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj. Sed antaŭ la liberiĝo de Ŝanhajo en 1949 tie estis nur tekstila industrio. Koncerne la maŝinan industrion, oni povis nur ripari kaj munti. Tiam Ŝanhajo povis produkti nur 5 000 tunojn da ŝtalo ĉiujare. Kaj mankis la instrumenta kaj elektronika industrioj. En 1984 la totala industria produktovaloro de Ŝanhajo estis 65 miliardoj da jŭanoj, 25-oble de tiu de la urbo en 1949, kaj 4-oble de tiu de la tuta lando en la sama jaro. Io simila aperis ankaŭ en aliaj urboj de Ĉinio. La industriaj branĉoj, kiuj disvolviĝis de nulo aŭ de malforta bazo, jam fariĝis gvida faktoro en la plejparto de la urboj. La industria disvolviĝo akcelis aliajn urbajn entreprenojn. En la industria konstruado formiĝis multaj novaj urboj. La konstruado kaj disvolvo de la urba industrio prosperigis la urbojn kaj radikale ŝanĝis ilian pozicion kaj rolon en disvolviĝo de la nacia ekonomio. Laŭ statistiko farita en 1983, la fiksa aktivo de la urbaj industrioj konsistigis pli ol 70% de tiu de la tuta lando. La totala produktovaloro, la imposto kaj profito donitaj al la





*Bele ornamita promenejo*

ŝtato kaj la nombro de laboristoj kaj oficistoj de la urbaj industrioj ĉiu konsistigis pli ol 80% de tiuj en la tuta lando. Cetere en la urboj koncentriĝis pliparto de la politikaj, ekonomiaj, sociaj, kulturaj, sciencaj kaj teknikaj institucioj. En la

urbaj superaj lernejoj studis pli ol 1.5 milionoj da studentoj, kiuj konsistigis 95% de tiuj de la tuta lando. La urboj jam fariĝis bazo de la socialismaj materia kaj spirita civilizacioj kaj moderna konstruado de Ĉinio. Ili ludas gvidan rolon

*Skulptaĵo en korto*







*Arta kaskado*



*Novaj loĝdomoj*

en la politika, ekonomia kaj kultura vivo de nia lando kaj elvolvas centran funkcion tiufланke.

### **BATALO KONTRAŬ LA “URBAJ MALSANOJ”**

En la procezo de urbigo de la evoluantaj kaj disvolviĝantaj landoj koncentriĝis en grandaj urboj industriaj entreprenoj kaj loĝantoj, rapide ekspansiis la loĝantaro, pli serioziĝis la problemoj de medio, ktp. Ĉio ĉi estas rigardata kiel seriozaj urbaj malsanoj kaj sociaj problemoj. Similaj malsanoj ekzistas certgrade ankaŭ en Ĉinio, ekz. la grandaj urboj disvolviĝis tro rapide, dum la malgrandaj urboj malrapide. La troa koncentriĝo de industrioj kaj loĝantoj en la grandaj urboj malutilas al racia dispozicio de produktado kaj racia ekspluato kaj utiligo de diverslokaj riĉfontoj. La troa pligrandiĝo de urba skalo kaŭzas serion da kontraŭdiroj en ter-utiligo, akvoprovizo, trafiko, loĝado, liverado de ĉiutagaj bezonaĵoj, medio, administrado k.a. Por solvi tiujn problemojn la ŝtato difinis la fundamentan principon por urba disvolviĝo “Limigo de la skalo de granda urbo, racia disvolvo de mezgranda urbo kaj aktiva disvolvo de malgranda urbo”. La principo estas paŝon post paŝo efektivigata.

La urba konstruado de Ĉinio havis malbonan bazon kaj malgrandan investo-pocenton de urbaj fundamentaj instalaĵoj en la pasintaj jaroj, tial la urbaj fundamentaj instalaĵoj ne povis kontentigi la bezonon de industria disvolviĝo kaj loĝantara kresko, tio kaŭzis multajn kontraŭdirojn. Ekz., al iuj urboj mankas akvofonto kaj ne sufiĉas la akvoprovizo, al aliaj mankas veturiloj kaj veturlinioj

de publika trafiko. Koncerne la ekonomian disvolviĝon de urboj, la industria disvolviĝo estis kompare rapida, dum la disvolviĝo de komerco, servokupoj kaj aliaj branĉoj de la terciara industrio malrapida, kio ne nur malhelpis plenan disvolvon de la rolo de urbo, sed ankaŭ formis unu el la gravaj faktoroj, kiuj kaŭzis malaltan sintezan ekonomian profiton de multaj urboj de Ĉinio.

La supre menciitaj problemoj kaŭziĝis unue de la eraroj en la gvida penso kaj politiko pri urba konstruado kaj due de la mankoj de la ekonomia administra sistemo. Ekz., la ekspansio de grandaj urboj estis kaŭzita ĉefe de malakordiĝo inter ili kaj ekonomiaj branĉoj kaj lokoj, de malakordiĝo inter la urba projekto kaj ekonomia plano. Tio plejparte estas kaŭzita de la mankoj de la ekonomia sistemo. Koncerne al tio, Ĉinio praktikas la reformon de la ekonomia sistemo por disvolvi la rolon de urbo en la ekonomia gvidado, forigi la disiĝon de regionoj kaj ekonomiaj branĉoj, akordigi la urban dispozicion kun la ekonomia plano. por ke la urboj organizu specialigitan produktadon kaj socian servadon, kio certe ludos gravan rolon por limigi la skalon de urboj.

La reformo de ekonomia sistemo praktikata en la ĉina kamparo akcelas la transiron de la vilaĝa ekonomio al specialigo, varigo kaj modernigo, kio multe akcelas la disvolviĝon de la kamparaj entreprenoj kaj urbetoj kaj la urbigon de Ĉinio. Ankaŭ la reformo de la ekonomia sistemo praktikata en la ĉinaj urboj siavice malfermos larĝan vojon al la sana disvolviĝo de urboj kaj urba konstruado de Ĉinio.

*\* La aŭtoro estas estro de la Ĉambro de Fundamenta Instalaĵo sub la Ĉina Instituto pri Konstruado kaj Ekonomio de Urbo kaj Kamparo.*

# TJANĜIN BATALAS KONTRAŬ NEINFEKTAJ MALSANOJ

Surprizas la statistiko farita de la Higiena Buroo de Tjanĝin en la fino de 1983: Tiujare en Tjanĝin mortis 27 000 homoj pro koronaria kormalsano, cerbaj hemoragio kaj trombozo kaj maligna tumoro, dum nur 69 mortis pro akutaj kaj kronikaj infektaj malsanoj. Kia diferenco! La analizo pri la kialoj de morto farita en la lastaj jaroj montris, ke la kvanto de la mortintoj pro infektaj malsanoj konsistigas nur 2.63% de la totala mortokvanto. La procentaĵo malkreskis de la unuaj tri lokoj en la kvindekaj jaroj ĝis post la sepa; la kvanto de la mortintoj pro koronaria kormalsano, cerbaj hemoragio kaj trombozo kaj maligna tumoro nun konsistigas 73% de la totala mortokvanto. La procentaĵo kreskis de la sesa aŭ sepa loko en la kvindekaj jaroj al la unuaj tri lokoj. Kompreneble, hipertensio ne rekte kaŭzas morton, sed ĝi sendube estas grava kialo de koraj, cerbaj kaj angiaj malsanoj. Ĉio ĉi montris, ke la kvar neinfektaj malsanoj supre menciitaj jam fariĝis la ĉefa minaco al la sano de Tjanĝinanoj.

Tial la medicinaj departementoj de la urbo decidis disvolvi socian preventadon de la kvar neinfektaj malsanoj dum preventado de infektaj. Tio estas nova paŝo de la ĉinaj medicinaj kaj higienaj rondoj.

Antaŭ nelonge mi veturis al Tjanĝin por fari enketon tiuflanke.

## SERĈI VOJON POR ŜANĜI MEDICINAN MODELON

“Disvolvi preventadon de la kvar malsanoj estas nepra sekvo de la disvolviĝo de la ĉina higiena afero en la nuna tempo,” diris Liŭ Baŭŝjang, respondeculo de la Higiena Buroo de Tjanĝin pri preventado de la kvar malsanoj.

Dank’ al la progreso de la socia ekonomio kaj pliboniĝo de la vivo de la loĝantoj, multe ŝanĝiĝis la suferataj malsanoj kaj la kialoj de morto, kompare kun tiuj en la kvindekaj jaroj. Rimarkinde reduktiĝis la morbokvanto pro infektaj malsanoj, parazitozo kaj endemio. La infektaj malsanoj estas preskaŭ briditaj. Kaj la morbokvanto pro neinfektaj malsanoj, kiel koronaria kormalsano, rapide kreskas.


Esploro pri ŝanĝiĝo de la nuntempaj malsanoj havas internacian signifon. La danĝero de koraj, cerbaj kaj angiaj malsanoj kaj maligna tumoro jam fariĝis grava problemo en la mondo, kiu estas neignorebla ne nur por la evoluintaj landoj, sed ankaŭ por la triamondaj landoj inkl. Ĉinion.

Liŭ Baŭŝjang diris al mi, ke la socia agado, psiko kaj medio es-

tas la ĉefaj kialoj de tiuj malsanoj, kiujn oni ne povas klarigi nur per teorioj de anatomio, fiziologio, biokemio kaj imunologio. La nuna kurac-sistemo de Ĉinio estas de biomedicina modelo, t.e. esplori kaj trakti la rilaton inter sano kaj malsano surbaze de biokarakteroj de la homa korpo. Tio jam ne konformas al la ŝanĝiĝema situacio. La kresko de la kvanto de suferantoj de la kvar malsanoj devigis la higienajn kaj epidemi-preventajn departementojn turni sin al esploro de neinfektaj malsanoj, transiri de individua medicino al kolektiva kaj de klinika medicino al socia, preni homon kiel konsistigan parton de la ekologia sistemo ampleksanta la naturan kaj socian medion, fari enketon pri la homa sanstato laŭ la vidpunktoj biologia, psikologia kaj sociologia kaj alpreni ĉiujn eblajn rimedojn por preventi kaj kuraci malsanojn. Tial la nuna biomedicina modelo de Ĉinio devas transiri al la modelo biologia-psikologia-sociologia. Tio estas la objektiva postulo kaj nepra sekvo de la moderna medicino.

En la komenco de 1984 Tjanĝin ekpaŝis por esplori transiron al nova medicina modelo. Ĝi establis specialan organizon por preventi la kvar malsanojn, alinomis la Tjanĝin-an Higienan kaj Epidemi-preventan Stacion la Higiena kaj Malsano-preventa





*Analizo de sang-graso de klientoj*

Centro. Nun komenciĝis la malfacilega kaj kompleksa socia preventado de la kvar malsanoj en Tjanĝin kun ĉok milionoj da loĝantoj.

### **POPOLA PREVENTO KAJ FRUA KURACADO**

Por vaste disvolvi la grandskalan preventadon de la kvar malsanoj en la dense loĝata urbo, ne sufiĉas la fortoj de la medicinaj kaj higienaj departementoj. Oni devas mobilizi ĉiujn fortojn de la socio por tiu laboro. La diversnivela higienaj organizoj de Tjanĝin en mallonga tempo establis gvidan trupon por prevento de la kvar malsanoj kaj apartan oficejon kaj faris bazajn konstruojn.

Antaŭ ĉio, oni starigis sisteman informan reton en la urbo. La 380 medicinaj organizoj kaj kuracaj servoj de la urbo havas

423 fakulojn por plenumi informadon pri la kvar malsanoj laŭ la identigita normo. Ĉiu higiena kaj malsano-preventa stacio funkcias kiel centro de administrado, konsultiĝo, kvalit-kontrolo kaj informo-komunikado. En 1984 oni ricevis sume 31 517 raportojn, kiuj liveris morbo- kaj morto-kvantojn kaj procentaĵojn de diversaj malsanoj. Oni enmetis la ciferojn en komputilon de la kalkulcentro de la Higiena Buroo de la urbo. La laboro donas ĉefajn materialojn pri la kvanto de suferantoj kaj mortintoj de la kvar malsanoj, tiel ke oni povas fari longtempan observadon, epidemiologian kaj soci-medicinan esploron kaj ellabori preventajn rimedojn.

Dum jaroj oni kutimis trakti medicinajn problemojn per nocioj kaj pensmanieroj de biomedicina modelo, emfazis la rolon de grandaj hospitaloj kaj institu-

toj en la prevento, diagnozo, kuracado, scienca esplorado kaj administrado kaj multe atentis diagnozon, kuracadon kaj esploron de malfacile kuraceblaj malsanoj kaj apartaj kazoj. Sekve de tio, formiĝis la kuraca kaj sanprotektita sistemo kun hospitalo kiel la centro kaj neglektiĝis popola prevento kaj kuracado kaj multaj kuracaj kaj sanprotektaj laboroj ĉe baza nivelo. La transiro de la medicina modelo kaj la tajdo de la monda nov-teknika revolucio forte atakas la ekzistantajn kuracajn kaj sanprotektajn establojn kaj formas novan sistemon kun prevento kaj resanigo kiel la ĉefa celo. Estas farita la alia baza laboro, ke la higienaj departementoj de Tjanĝin establis 13 observajn bazlokojn por protekti 450 000 loĝantojn kontraŭ la kvar malsanoj. En la bazlokoj laboras profesoroj, esploristoj kaj loĝantoj. Ilia tasko estas

perfektiĝi la informan sistemon kaj kontrolan reton, persisti en prevento kaj fari higienan propagandon kaj ĝeneralan enketon pri la sano de la loĝantoj por frue trovi, diagnozi kaj kuraci pacientojn.

La laborantoj pri prevento de la kvar malsanoj en la sanitarejo de Ŝenĝuangzi, Hedong-distrikto, kun helpo de la loĝkvartalaj komitatoj, en nur unu kaj duona monatoj esploris 34 614 homojn de pli ol 10 000 familioj, t.e. 98.6% de la loka loĝantaro. Ili faris ankaŭ korpan ekzamenon al 12 657 homoj super la aĝo de 35 jaroj kaj trovis, ke 3 138 homoj suferas hipertension. Ilia laboro ŝanĝis la kutimon, ke malsanuloj vizitas kuraciston, kaj efektivigis preventon, fruajn diagnozon kaj kuracadon.

### **KOMBINO DE PREVENTO, KURACADO KAJ FLEGADO**

Generale, la akuta miokardia

infarkto kaŭzas morton al 90% de la suferantoj, kiuj ne sukcesas viziti hospitalon. Por fari efikan urĝan savon al la suferantoj de koronaria kormalsano kaj cerbaj hemoragio kaj trombozo kaj malaltigi la mortokvanton, la urba preventa departemento de la kvar malsanoj ellaboris unuecajn teknikajn normojn por refunkciigi la koron, pulmojn kaj cerbon. La normoj estas praktikataj unue en la hospitaloj kaj sanitaraj servoj kaj inter la trafikaj policanoj kaj ŝoforoj.

En la lastaj du jaroj la higienaj departementoj de Tjanĝin, surbaze de la ĝenerala enketado pri la kvar malsanoj, persistas en kombinado de prevento, kuracado kaj flegado.


Ili popularigas sciojn pri prevento de la kvar malsanoj per ĵurnaloj, gazetoj, disaŭdigo, televido, filmoj, kursoj, sciencaj broŝuroj ktp. Ili admonis la loĝan-

tojn "ne fumi, ne manĝi pli da salo por ne levi siajn tension kaj korpopezon.

Konsiderante, ke iuj ŝatas tro salan manĝaĵon, ili kompilis kaj disdonis kartojn kun la titolo "Tro Sala Manĝaĵo Kaŭzas Hipertension kaj Koronarian Kormalsanon", en kiuj ili montris la danĝeron de tro sala manĝaĵo. Ili helpas scienc-esploran organizon fari salon kun malmulte da natrio kaj pretas difini la kvanton de salo bezonata de malsamaj homoj, por ke ili forlasu la kutimon manĝi tro multe da salo.

Hi disdonis inter la loĝantoj 600 000 broŝurojn kaj kartojn pri tiuflankaj scioj. Ekkoninte la kaŭzojn de la kvar malsanoj, oni komencas ŝanĝi siajn vivkultimojn. Iuj abstinis de fumado kaj aliaj ne prenas tro salan manĝaĵon.

### *Terapio*





La higienaj departementoj de Tjanĝin samtempe turnas sian atenton sur preventon, kuracadon kaj flegadon. Nemalmultaj kuracaj servoj funkciigas ambulatorion por kuraci suferantojn de la kvar malsanoj, faras regulan kuracan registron kaj flegas malsanulojn en la hejmo kaj hospitalo.

La sanitarĵo de Ĝingĝingonglu de Hebej-distrikto metis spertajn kuracistojn en ambulatorion por akcepti patientojn kaj plenumi ilian konsulton. Nun ĝi jam akceptis 300 patientojn. Antaŭe ĝi ne havis specialan ambulatorion kaj neglektis miokardian infarkton, kio multe suferigis la patientojn. La speciala ambulatorio estas bonvena al la patientoj. Estis iu patiento, kiu plendis pri sia dorsa doloro kaj senĉesa vomado. Kuracisto konstatis post diagnozo, ke li suferas

enteriton. Poste la patiento vizitis la specialan ambulatorion kaj post ekzameno per elektrokardiografo oni diris, ke lin atakas miokardia infarkto. Alia patiento suferis seriozan neŭrasention, sed kelkaj hospitaloj opiniis, ke li suferas koronarian kormalsanon, kio ege maltrankviligis lin kaj li devis longe ripozi hejme sen laboro. Poste li vizitis la specialan ambulatorion, kie kuracistoj kelkfoje faris al li diagnozon kaj medikamentan eksperimenton kaj ekzamenis lin per elektrokardiografo. Fine ili neis la misdiagnozon de la hospitaloj, ke li ĝoje revenis al sia laboro.

La sanitarĵo Ŝenĝuangzi de Hedong-distrikto kuracas ĉefe korajn kaj angiajn malsanojn. Ili enhospitaligas serioze malsanajn patientojn kaj kuŝigas resaniĝantajn patientojn en "hejmaj malsanulaj litoj". Kaj tiel 3 148

suferantoj de hipertensio kaj 340 suferantoj de koronaria kormalsano de la distrikto ricevis kuracadon kaj flegadon.

En la lastaj jaroj "hejmaj malsanulaj litoj" estis vaste instalitaj. La totala nombro de tiaj litoj jam superis 100 000. La patientoj plejparte estas suferantoj de la kvar malsanoj. Oni povas aserti, ke uzi "hejmajn malsanulajn litojn" estas grava rimedo por efektiviigi preventon de la kvar malsanoj.

En la urbo mi trovis, ke oni laŭstrate enterigas gastubojn, kio estas paŝo de la magistrato por redukti la polucion kaŭzitan de bruligita karbo kaj malkreskigas la morbokvanton de pulma kancero. La laboro finiĝos venontjare. Samtempe kun tio, la mediprotektaj organizoj helpas entreprenojn reformi fumtubojn serioze poluciantajn.

*Medicinistinoj ordigas kartojn por informi pri la kvar malsanoj.*





*Binhe-parko rigardata de alte*

# La rubanda parko de Ŝenjang

de GE ŜI

Kiam vi aviadile veturas super la urbo Ŝenjang, vi povas trovi tra luko, ke verda rubando serpentumas tra la suda parto de la urbo, kio donis al la iama monotona industria urbo viglan kaj gajan nuancon. Jen la Rubanda Parko ĉe la Suda Kanalo finkonstruita en aŭgusto de 1985.

Mi vizitis ĝin, gvidate de Baj Ŭenŝiŭ, ĝenerala inĝeniero de la Verdiga Departemento de la urbo kaj gvidanto de la projek-

tado kaj konstruado de la parko. Li diris al mi, ke la parko okupas areon de 394 hektaroj, inkluzive kanalan kaj laĝetan akvosurfakon de 80 hektaroj. La Suda Kanalo, trapasanta la Rubandan Parkon, havas totalan longecon de 14.5 kilometroj, de Dongta-kluzpordo de Hunhe-rivero en la oriento ĝis Long-ŭangmjaŭ-kluzpordo de la rivero en la okcidento. Ambaŭborde de la kanalo nun ĉarmas 6 ĝardenoj kun 18

vidindejoj kaj 234 hektaroj da gazonoj.

Ĉe la kanalo mi vidis, ke plezurboatoj sin movas sur la ondanta akvo kaj la verdaj arboj kaj gazonoj prosperas ambaŭborde de la kanalo. Tie la kanalo, gazonoj, floroj kaj arboj portas al la loĝantoj humidan, aroman kaj freŝan aeron, pavilonoj kaj kioskoj speguliĝas en akvo kaj sin kaŝas en la ombroriĉa arbaro.

La Aŭrora Ĝardeno, sidanta



ĉe la orienta ekstremo, estas la deirpunkto de la parko. Ĝenerala inĝeniero Baj diris, ke la ĝardeno nomiĝas Aŭroro pro tio, ke ĝi plej frue vidas la sunon ĉiutage. En ĝi estas infana amuzejo, kie la naivaj infanoj komencas la vivan uverturon de la homaro.

Mi paŝas laŭ la kanalo. Estas malsamaj la objektoj en malsamaj pejzaĝoj kaj ŝanĝiĝas ankaŭ la pejzaĝoj laŭ la rivero. Tie troviĝas kvar-sezonaj ĝardenoj. En la Printempa Ĝardeno la plantaĵoj bele floras en printempo. En la Somera Ĝardeno la vegetaloj floras kaj aromas somere ĉe la kanalo. En la Aŭtuna Ĝardeno la verdaj grimpoplantoj kaj ornamaj vegetaloj plibeligas la pejzaĝon de aŭtuno. En la Vintra Ĝardeno ĉiam verdas la pinoj kaj cipresoj, kio portas al vintro pli da viveco.


Ŝenjang en la antikveco havis ok pitoreskejojn, unu el ili nomiĝis Saliko-laga Somerumejo, nome la nuna Salikarbara Ĝardeno. La ĝardeno konstruiĝis sur ĝia

ruino. Baj diris al mi, ke antaŭ konstruado de la ĝardeno, tie troviĝis sablaj kavoj, ĉiuj pejzaĝoj en la ĝardeno aperis antaŭ nelonge. Por reaperigi la pasintan Saliko-lagan Somerumejon, oni metis salikojn en regantan pozicion de la ĝardeno. La pordoj de la ĝardeno formiĝis el salikaj branĉoj interligitaj. La ĝardeno estas salika lando, kie kreskas 13 specoj de salikoj. La Glediĉia Ĝardeno ricevis la nomon pro sia glediĉia arbaro. La ŝtona ponteto kaj la kioskoj ĉe la bordo plibeligas la pejzaĝon. En la ĝardeno, la fontano regata de muzikaĵoj ĉiuvespere altiras al si centojn da vizitantoj. La Kvietaj Ĝardeno estas gracia. Interne de la pordo estas knabina statuo en legado, kio faris la vizitantojn malrapidigi la paŝojn por ne ĝeni ŝian legadon. La bronza statuo "luktanto" ĉe la apudvoja gazono kondukas vin al marbordo. La alte leviĝantaj brakoj, kaj la lerta kaj fortika korpo de la surfotabulanto instigas vin lukti kontraŭ la malfaciloj.

Antaŭe la loko estis tre malpura. Baj diris al mi, ke la Suda Kanalo trapasanta la Rubandan Parkon estis fosita en la komenco de la 50-aj jaroj por dreni la malpuran akvon de la suda parto de Ŝenjang. Pro diversaj kaŭzoj, la kanalo estis grave damaĝita, la fluejo estis ŝtopita de ŝlimo kaj fariĝis longa malfermita kloako. La malpura akvo de la fabrikoj kaj loĝantoj ambaŭborde estis kondukita en la kanalon, tial ĝi odoris haladze. En ventaj tagoj, la loĝantoj en la loko trapasita de la vento multe suferis la haladzon. La verdigitaj bordoj de la kanalo fariĝis rubejoj, eĉ la vojoj estis baritaj, tie generis granda nombro da moskitoj kaj muŝoj. Pri tio multe grumblis la loĝantoj ambaŭborde de la kanalo.

En 1984, laŭ la postulo de la loĝantoj, la magistrato de Ŝenjang prenis reordigon de la Suda Kanalo kaj konstruadon de la Rubanda Parko kiel unu el la dek bonaj aferoj farendaj tiujare por la urbanoj kaj komencis la

### *Ĉe strato*



riveran reordigon. La konstruado estis tre granda, ĝi inkluzivis 5 taskojn, nome radikala reordigo de la kanalo, etendigo kaj vastigo de la vojoj apud la kanalo, plena verdigo de la bordoj, konstruado de ĝardenaj pejzaĝoj, beligo de la urbo kaj reordigo de stratoj.


La konstruado estis granda, kaj multe utila al la urbanoj, tial en la 16-monata konstruado ĉiuj entreprenoj, institucioj, lernejoj kaj multaj loĝantoj aktive partoprenis la konstruadon de la Suda Kanalo. La entreprenoj kaj loĝantoj ĉe la kanalo aktive malkonstruis siajn domojn malhelpantajn la konstruadon, tio mul-

te faciligis la konstruadon. Iuj entreprenoj kun ekonomia forto laŭkontrakte plenumis sume 198 ĝardenajn konstruojn. 2.44 milionoj da urbanoj aktive partoprenis la konstruadon kiel volontuloj. La garnizono en Ŝenjang kontribuis al ĝi 213 000 labortagojn. La departementoj de materialoj, transportado, akvo kaj elektro, financo ktp., rompinte la rutinon, aktive solvis ĉiujn problemojn aperintajn en la konstruado.

Dank' al la komuna klopodo de la urbanoj fine estis konstruita la Rubanda Parko. En la parko fluas klara akvo, ombras arboj, interligiĝas la ĝardenoj, bun-

tas floroj, glate trafikas la vojoj kaj ĉarmas la pejzaĝoj. Ĝi kombiniis en si la akvejon, verdaĵojn, ĝardenojn, vojojn kaj stratajn pejzaĝojn. La parko povas dreni inundan akvon en pluva sezono kaj pliigi subteran akvon. Ĝi ludas gravan rolon en klimatoreguligo, medio-bonigo kaj aerpurigo. La parko havigas al la civitanoj bonordan, puran kaj belan medion. Kiam maljunuloj babilas kaj ŝakludas sub arboj, gejunuloj remas surakve kaj geknaboj gaje ludas en la parko, la floroj, arboj kaj gazonoj ĝuigas al ili komforton kaj ripozon, kaj refreŝiĝas ankaŭ ilia animo, inspire rate de la beleco.

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. *Sanhajo*

2. *Zanda-gubernio*

3. *Tjanĝin*

4. *Ŝenjang*

5. *Anjang*

6. *Ĝengĝoŭ*



# LA ORIGINO DE LA ĈINA CIVILIZACIO

*Ŝja Naj, unu el la fondintoj de la ĉina arkeologio, estis elektita kiel koresponda membro de la Brita Akademio kaj Germana Arkeologia Instituto. En la arkeologiaj rondoj de Ĉinio li estis fakulo, kiu ricevis plej multe da honoraj titoloj de la superaj akademiaj organizaĵoj de aliaj landoj. Li mortis la 19-an de junio, 1985. Ĉi-sube estas mallongigita parto de lia verko.*

**La Red.**

Nun la historiografaj rondoj per la vorto "civilizacio" karakterizas la socian etapon, en kiu disfalis la klana sistemo kaj aperis klasoj kaj ŝtata strukturo. En tiu socio, krom la politika organizo — ŝtato, aperis ankaŭ urbo kiel centro politika (palaco kaj oficejo), ekonomia (metio kaj komerco) kaj kultura (inkl. de religio). Tiam oni jam kreis skriban lingvon kaj per ĝi faris noton, sciis fandi metalon. La plej grava marko de civilizacio estis skriba lingvo.

En 1928 ĉinaj arkeologoj komencis prifosadon ĉe Ŝjaŭtun-vilaĝo de Anĵang, Henan-provinco. En la 30-aj jaroj oni konstatis, ke la kulturo de la dinastio Ŝang\* vere estis brila civilizacio. Tiam la fakuloj opiniis, ke Ŝjaŭtun-kulturo de Ŝang-dinastio estis la plej frua civilizacio de Ĉinio. Se la alte evoluinta kulturo de Ŝjaŭtun estus rigardata kiel la komenco de la ĉina civilizacio, tio signifus, ke bebo denaske havas blankan barbon. Tial iuj opiniis, ke la ĉina civilizacio devenis de la Okcidento. Tamen la afero ne estis tiel simpla. Dank' al nia pli-ol-30-jara arkeologia laboro, ni akiris pli profundan konon pri Ŝjaŭtun-kulturo de Ŝang-dinastio.


## ŜJAŬTUN-KULTURO DE ŜANG-DINASTIO

Ŝjaŭtun-ruino de Ŝang-dinastio troviĝas ĉe la suda bordo de Hŭan-rivero, je 3 km. nordokcidente de la urbo Anĵang. Ĝi estis la ĉefurbo de

Ŝang-dinastio en ĝia lasta periodo, tio estis notita en historia literaturo. Ĝenerale, oni opinias, ke ĝi estis la ĉefurbo de Ŝang-dinastio dum la periodo de 1300 a.K. ĝis 1027 a. K.

La arkeologia prifosado montris, ke en la posta periodo de la 2-a jarmilo a.K. Ŝaŭtun de Ŝang-dinastio jam estis urbo kompare granda. En la centra kvartalo de la urbo estis pluraj ramitaj dombazoj, apud kiuj estis metiejoj de bronzaĵoj, ceramikaĵoj, jadaĵoj, ŝtonaj kaj ostaj iloj. Tiam la metio jam disiĝis de agrikulturo. Ĝi sufiĉe disvolviĝis kaj koncentriĝis en la urbo. Meze de la centra kvartalo estis kavoj de entombigoj, kiuj ŝajne estis viktimoj por domkonstruado aŭ kulto al diabloj kaj dioj. Oni tenis sisteme testudajn ŝelojn kun ĉizitaj skribaĵoj en la kavoj kiel arki-vojn.

La plej okulfrapaj estis la reĝaj tomboj en la nordokcidenta altaĵo, je 2.5 km. for de Ŝjaŭtun. Tie estis 8 grandaj tomboj, el kiuj la plej granda havis areon de 1 800 kvadrataj metroj kaj profundon de pli ol 15 metroj. La tomboj ĉiu havis almenaŭ dekojn aŭ maksimume du centojn da entombigoj. Okcidente de Ŝjaŭtun-ruino mal-kovriĝis pli ol mil malgrandaj tomboj, ĉiu kun 2-4-metra longeco, unu-metra larĝeco kaj 2-3-metra profundeco, kies skalo estis multe malpli granda ol tiu de la grandaj tomboj, kaj la diferenco de iliaj kunentombigitaj objektoj estis des pli granda. El tio oni povas vidi, kiel grave polari-



Bronza vinujo

ziĝis siatempe la klasoj kaj hierarkio, kaj ankaŭ la tiaman entombigan moron.

## LA SKRIBA LINGVO DE ŜANG-DINASTIO

Unu el la gravaj simboloj de civilizacio estas skriba lingvo. Sur la elterigitaj ceramikaĵoj, jadaĵoj kaj testudaj ŝeloj de Ŝang-dinastio plurfoje vidiĝis skribaĵoj. Oni elterigis sume pli ol 160 000 pecojn da testudaj ŝeloj kun ĉizitaj ideografiaĵoj. La skribaĵoj sur la testudaj ŝeloj estis ĉefe hieroglifaj. Kvankam la formoj de la ĉinaj ideografiaĵoj nun ne plu similas al tiuj de la originalaj objektoj, tamen ili fundamente observas la regularon de la skriba sistemo de Ŝang-dinastio. La tiama skriba lingvo estis uzata por noti paro-

lon, kaj ne plu estis sola signaro. En la skribaĵoj sur ŝeloj oni povis noti historiajn aferojn, inkl. de la nomoj de reĝoj kaj iliaj subuloj, militoj, kultaj ceremonioj, ĉasado, dato kaj loko de historiaj aferoj. Tio montris, ke la kulturo de la ruino de Ŝang-dinastio jam eniris en la novan historian etapon kaj havis ne sole skriban lingvon.

## PROGRESA BRONZA MULPARTO

La bronza mulparto de Ŝang-dinastio plej klare montris la altan nivelon de la tiama civilizacio. La bronzaĵoj de Ŝang-dinastio inkluzivis porceremoniajn ujojn, kaj vinujojn, manĝaĵojn kaj muzikilojn, kiaj tintiloj kaj sonoriloj, armilojn, laborilojn kaj veturilajn ornamaĵojn. La kuriozaj porceremoniaj ujoj kun belaj desegnoj estas rigardataj kiel unu el la plej elstaraj atingoj en la teknika disvolviĝo de la antaŭhistoria civilizacio. El la pli ol 400 bronzaĵoj elterigitaj en Fuhaŭ-tombo de Anjang, multaj estas kun delikataj formoj kaj belaj desegnoj. El ili du kvadrataj tripedaj *ding*-oj (ujoj) ĉiu kun alteco de 80 cm kaj pezo de pli ol 100 kg, distingiĝas per imponeco. La invento de la bronza mulparto kaj ĝia vasta aplikado havas gravan signifon. Por tion fari nombro da lertaj muldistoj estis bezonata. Kaj cetere necesis ankaŭ vigla komercado kaj glata trafikvojo por transporti krudajn materialojn kaj produktaĵojn. Por konformiĝi al la nova ekonomia stato, inkl. de la disvolviĝo de produktaj fortoj, oni devis pli malpli reformi la socian kaj politikan sistemon.

## ORIGINALAJ TRAJTOJ DE ŜANG-KULTURO

Krom la tri ĝeneralaj trajtoj (urbo, skriba lingvo kaj bronzaĵoj) de civilizacio, la kulturo de la ruino de Ŝang-dinastio havas ankoraŭ siajn proprajn trajtojn: Unu el ili estas skulptitaj jadaĵoj. En la tombo Fuhaŭ elteriĝis 750 objektoj, kies plejparto estis jadaĵoj. Ili estas la plej grandnombraj kaj multspecaj jadaĵoj, delikate skulptitaj, ĝis nun elterigitaj. Multaj el ili superis la antaŭe konitajn jadaĵojn. Ili estis lerte faritaj kaj eĉ povas esti rigardataj kiel superaj metiartaĵoj laŭ la formoj kaj desegnoj. La desegnoj sur la jadaĵoj kaj bronzaĵoj estas grava parto de la kulturo de la ruino de Ŝang-dinastio.

Uzi ĉevaltiratajn veturilojn estas la kvina trajto de la civilizacio de la ruino de Ŝang-dinastio. En la 30-aj jaroj oni trovis en Anjang kelkajn kavojn kun tiamaj ĉevaltirataj veturiloj.



La sesa trajto de la civilizacio de la ruino de Ŝang-dinastio estas disvolviĝo de ceramiko. Tio montriĝis ĉefe en la grandnombraj grizaj ceramikaĵoj. Anstataŭ la ruĝaj, brunaj kaj nigraj ceramikaĵoj, ili fariĝis la ĉefa parto de la ceramika produktado. Tio montriĝis ankaŭ en apero de blankaj ceramikaĵoj kun ĉizitaj strioj kaj bakado de primitivaj porcelanaĵoj, kies arto poste iom post iom perfektigis en la malsupra baseno de Jangzi-rivero, kaj fine en la posta periodo de Han-dinastio (206 a.K.—220 p.K.) ĝi aperigis porcelanaĵojn kaj formiĝis unu el la trajtoj de la ĉina civilizacio.

Antaŭ la 50-aj jaroj iuj opiniis, ke la kulturo de la ruino de Ŝang-dinastio estis komenco de la ĉina civilizacio. Aliaj opiniis, ke antaŭ tio ekzistis pli antikva kaj pli primitiva periodo de la ĉina civilizacio. Tamen pro manko de atestoj tio restis nur konjekto. La pli-ol-30-jara arkeologia pri-fosado post la naskiĝo de la nova Ĉinio puŝis nian studon pri la origino de la ĉina civilizacio al pli frua tempo ol tiu de la kulturo de Ŝjaŭtun-ruino, kaj unue al Erligang-kulturo, Ĝengĝoŭ.

## ERLIGANG-KULTURO

La ruino de Erligang de Ĝengĝoŭ estis malkaŝita en 1951. La tieaj restaĵoj similas al tiuj de Anjang. Ĝia kultura epoko povas esti rigardata pli frua ol tiu de Ŝjaŭtun-kulturo de Ŝang-dinastio. Ĝi apartenis eble al la periodo de 1750-1350 a.K. Laŭ la konataj materialoj la kulturo de Erligang kun la loko kiel la centro ekzistis en la regiono inter Gaŭĉeng de Hebej en nordo, Hŭangpi de Hubej en sudo, Hŭaŝjan de Ŝenŝji en okcidento kaj Jidu de Ŝandong en oriento. En la lastaj jaroj oni plurfoje trovis ruinojn de Erligang-kulturo en tiu regiono.


La kulturo de Erligang havis tri ĉefajn karakterizaĵojn de la civilizacio. Ŝang-urbo de Ĝengĝoŭ kun proksimume 7-kilometra urbomura perimetro el ramita tero okupis totalan areon de ĉ. 25 kvadrataj kilometroj. Ĉe ĝia nordoriento troviĝas vasta ramita teraso, kiu eble estis ruino de la tiama palaco. En ĝia proksima antaŭurbo estis ruinoj de kelkaj metiejoj, inkl. de bronzmuldejo, ostoprilaborejo, ceramikbakujo k.a. Ankaŭ Panlong-urbo de Hŭangpi havis urbomurojn el ramita tero, kies perimetro estis nur 1.1 km. kaj interne de ĝi estis bone konservita ruino de palaco. La kulturo de Erligang havis


skriblingvan sistemon. Tie oni elterigis tri ostopecojn kun ĉizitaj hieroglifaĵoj. Du el ili ĉiu havis nur unu hieroglifaĵon, dum la tria dek hieroglifaĵojn, ŝajne faritajn en ekzercado. Ankaŭ ĝiaj ceramikaĵoj surhavis ĉizitajn signojn, kiu tamen ne estis skribaĵo. Cetere tie iam elterigis bronzaĵoj. Sole en Ĝengĝoŭ elterigis du grandaj kvadrataj tripiedaj *ding*-oj. La desegnoj sur la bronzaĵoj, ceramikaĵoj kaj jadaĵoj montris rudimentan artan stilon de Ŝang-dinastio. Tial la kulturo de Erligang povas esti rigardata kiel civilizacio kaj apartenas al tiu de Ŝang-dinastio.

## LA KULTURO DE ERLITOŬ


La pli frua kulturo ol tiu de Erligang estis la kulturo de Erlitoŭ, kies ruino situas je 9 km.

*Skribaĵo sur besta ostoj en Ŝang-dinastio*





*Jada ponardo*



*Jada elefanto*

sudokcidente de Janŝi, Henan-provinco, kaj estis trovita en 1957. Tie eble kuŝis la ĉefurbo de Ŝang-dinastio Ŝjibo inter 1900 a.K. kaj 1500 a.K. La kulturo de Erlitoŭ troviĝis, laŭ la konataj materialoj, koncentre en okcidenta Henan kaj sudokcidenta Ŝanŝji. La kulturo de Erlitoŭ, almenaŭ en ĝia lasta periodo, jam atingis la stadion de civilizacio. Unue, tie iam elteriĝis palaca ruino kun totala areo de ĉ. 10 000 kvadrataj metroj en la lasta periodo de la kulturo de Erlitoŭ. Ekster la palaca tereno estis ruinoj de metiejoj de ceramikaj kaj bronzaĵoj. Due, tiam ŝajne estis skriblingva sistemo. La ĉizitaj signoj sur elterigitaj ceramikaj pecoj montris, ke ili apartenas al la lasta periodo de la kulturo de Erlitoŭ. Trie, la elterigitaj bronzaĵoj inkluzivas laborilojn, armilojn kaj vinujojn. La formoj kaj desegnoj de iuj jadaĵoj montris jam rudimenton de la kulturo de la ruino de Ŝang-dinastio. Unuvorte, la kulturo de Erlitoŭ havis rektan kaj nerektan rilaton kun la pli postaj kulturoj de Erligang kaj Ŝjaŭtun.

## ĈU LA ĈINA CIVILIZACIO DISVOLVIĜIS MEMSTARE?

La kulturo de Erlitoŭ, laŭ la enhavo kaj loko, evidente disvolviĝis de tiu de Longŝan, Henan kaj eble asimilis elementojn de alilokaj kulturoj, ekz., la pli posta kulturo de Longŝan, Ŝandong. Mi opinias, ke la ĉina civilizacio disvolviĝis ĉefe memstare, tamen mi ne ekskluzivas la eksteran influon dum la evoluo. La arkeologiaj atestoj konfirmis, ke Ĉinio ne tute izoliĝis de la ekstera mondo, tamen la ĉina civilizacio kreskis ja sur la ĉina teritorio. La neolitika kulturo de Ĉinio jam posedis iujn ĉinajn trajtojn, surbaze de kiuj disvolviĝis la ĉina civilizacio. Kompreneble, ankoraŭ multaj neklaraj problemoj pri la origino de la ĉina civilizacio atendas pluapŝan studon.

\* Ŝang (la 16-a jc. a.K. — la 11-a jc. a.K.) antaŭe estis nomo de iu tribo. En la 16-a jc. a.K. Tang, tribestro de Ŝang, konkeris Ŝja-regnon kaj fondis sklavan ŝtaton kun Bo (norde de la nuna Ŝangĉiŭ, Henan-provinco) kiel la ĉefurbo. Ĝia ĉefurbo translokiĝis plurfoje kaj fine fiksiĝis en Jin.

Solvo por "Solvo manĝas solvon" Rano kaj serpento.

Solvoj por "Ĉu vi scias?"

1. Kokovo
2. Mensogo
3. Via nomo
4. Horloĝo
5. Balailo
6. Poŝtmarko






*Bronzaj vinuoj en formo de orelstrigo elterigitaj ĉe la ruino de Sang-dinastio* Foto de ŬANG LU

*Ebura vinujo elterigita ĉe la ruino de Sang-dinastio*  
Foto de ŬANG LU



*Marmora bovo elterigita ĉe la tombo Fuhaŭ* Foto de ŬANG LU



# Allogi birdojn—urĝa tasko

de LI ĈJANG



*Birdoj ĉe movoplana strato.*

Foto de JANG JUNGIN



*Jus farita birdo-meto*

Foto de LAŬ BAJ





*Bredado de grizaj pigoj*



*Nutrado al birdoj* Foto de LAŬ BAJ



*Prof. Ĝeng Zŭoŝin, prezidanto de la Monda Fazaneda Asocio kaj honora prezidanto de la Ĉina Ornitologia Instituto, traktas la signifon de bird-allogo.* Foto de ĜANG ZŬOŬANG



*Birdoj ĉe Longĝjang-rivero*  
Foto de JANG JUNGIN

*Allogita pigo*

Foto de ĜANG ZŪOŠŪANG





Ne aŭdiĝis pepado de birdoj en Pekino nemalmultajn jarojn. Eĉ en printempo aŭdiĝas nenia gaja birda kanto krom la urba bruo. Iu diris: Pekino estas senbirda urbo.

Origine en Pekino ne mankis birdoj. Ĝi estis ĉarma urbo kun floroj kaj birdoj. Poste rekonstruado de la urbo okupis grandan nombron da agroj kaj detruis vivmedion de birdoj, tial sennombraj birdoj forflugis. Krome, pro erara opinio oni eĉ rigardis la paserojn kiel fibirdojn kaj grandnombre mortigis ilin, ke ili preskaŭ malaperis. En la tagoj por tion fari, malfeliĉo trafis ne nur paserojn, sed ankaŭ pigojn, grizajn pigojn, korvojn kaj aliajn birdojn. Ankaŭ troviĝis homoj kvankam tre malmultaj, kiuj ĉasas birdojn per pafiloj, katapultoj kaj retoj pro distriĝo aŭ fran-

demo. Ankaŭ estis pafmortigita blanka cigno, kiu estis fluganta suden por pasigi vintron kaj ripozis en Pekino.

La birdoj pli kaj pli malmultiĝis kaj la detruita ekologia ekvilibro komencis puni la homojn. La regiono ĉirkaŭ la Templo de Kuŝa Budho en la okcidenta antaŭurbo de Pekino estas fama pitoreskejo. Malantaŭ la templo etendiĝas la bela valo Jingtaiĝoŭ, strio da klara fontakvo fluas malsupren de la monto, sur kiu kreskas densaj arboj. Antaŭe diversspecaj birdoj tie amuziĝis, ripozis kaj serĉis manĝaĵon. Sed post kiam birdoj malaperis, fiinsektoj komencis furiozi, velkis arboj pro atako de fiinsektoj kaj la verda monto fariĝis malhel-flava. Por mortigi fiinsektojn oni ŝprucigis milojn da tunoj da insekticido per aeroplano. Oni

venenis ne nur fiinsektojn sed ankaŭ iliajn naturajn malamikojn kaj la jam tre malmultajn birdojn, kiuj prenis fiinsektojn kiel manĝaĵon.

Iuj fiinsektoj nevenenitaj plimultiĝis rapide kaj atakis des pli furioze ol iam antaŭe. La arboj suferis pli gravan atakadon. Ankaŭ la rojakvo estis poluciita de insekticido. La valo Jingtaiĝoŭ estis baldaŭ perdonta sian vivecon. La Templo de Kuŝa Budho kaj aliaj ĝardenoj spertis la samon.

Oni iom post iom komprenis el seriozaj lecionoj gravecon protekti birdojn. Nun la paseroj estas protektataj. Estas tute malpermesite kapti kaj mortigi sovaĝajn birdojn. Ŝtelaj ĉasantoj de birdoj pli kaj pli malmultiĝas. Oni atendas, ke birdoj kiel eble plej frue reflugu al la urbo.

### *Dismeto de birddometoj*



Nuntempe en Ĉinio estas pli ol 1 100 specoj de birdoj, kiuj konsistigas 14.4% de la totala nombro de la birdoj de la mondo, kaj Ĉinio estas unu el la landoj kun plej multaj specoj de birdoj. Sed nun 183 specoj de birdoj vizaĝas al la danĝero esti pereigitaj kaj baldaŭ malaperos, se oni ne prenos rimedojn por ilin protekti kaj savi. Pro tio Song Ĉjan, estro de la Ŝtata Scienca kaj Teknika Komisiono, proponis, ke la pekinaj sciencistoj kaj teknikistoj protektu kaj bredu birdojn. Tiu propono diseŝiĝis inter multaj specialistoj, kaj en Pekino oni konstruis la birdallogajn punktojn Hongje, Hŭoĝju kaj Ŭanŝoŭ.

Por allogi kaj bredi birdojn la Pekina Botanika Ĝardeno faris la konstruaĵon Hongje en la arbara regiono ĉe la Templo de Kuŝa Budho kaj la valo Jingtaiĝoŭ. Ili priplantis la floran ĝardenon antaŭ la Templo de Kuŝa Budho per bambuoj, kiuj ludas gravan rolon en allogado de birdoj. En la unua jaro dekmilo da siberiaj fringoj tie travintris. Por ke la birdoj restu ĉi tie, en la lastaj jaroj ili dislokis 876 birdodometojn el lignaj platoj dikaj je 5 centimetroj kaj kun ronda enirejo. Tiuj lignaj dometoj estas fiksitaj sur altaj branĉoj. La paruoj ŝatas verdon, sturnoj ruĝon kaj pegoj arboŝelan koloron, tial la dometoj estas kolorigitaj per


malsamaj koloroj, por ke la birdoj libere ilin elektu.

Krom loĝejo oni devas doni al birdoj ankaŭ sufiĉe da nutraĵo kaj akvo. Pasintec nur 10% de paruoj postvivis kaj la aliaj mortis pro manko de nutraĵo en frostavintro. Por ke la birdoj havu nutraĵon en vintro, oni konstruis tri grandajn kaj 24 malgrandajn nutrejojn, sur kiuj estas metitaj pecigitaj sunfloraj semoj en vintro. Nun oni ne plu uzas insekticidon, tial la rojakvo denove fariĝis pura. Vintre la nordaj riveroj glaciigis. Tiam oni truas glacieron de rivero kaj aranĝas akvotrinkejojn por birdoj.

Post du jaroj la konstruaĵo Hongje jam ekmontris sian efikon. Pli ol 800 artefaritaj birdodometoj jam havas siajn loĝantojn. La plejparto el ili estas paseroj, kaj la ceteraj estas paruoj, bluj paseroj kun ruĝa beko, grizaj pigoj kaj pegoj. Dank' al ili, fiinsekta malutilo reduktiĝis, arboj reverdiĝas kaj denove aperis bela pejzaĝo.

La konstruaĵo Hŭoĝju situas en la Infana Scienca Parko de la Okcidenta Distrikto en la urbo. En ĝi estas dislokitaj 300 artefaritaj birdaj nestoj kaj 15 nutrejoj; en la konstruaĵo Ŭanŝoŭ de la Somera Palaco 600 kaj en Ĝongnanhaj en la centro de la urbo 35 tiaj nestoj. Nun ili jam allogis multajn birdojn kaj ludas aktivan rolon en ekstermo de fiinsektoj kaj beligo de medio. En baldaŭa estonteco pli multaj belaj birdoj alflugos al Pekino kaj tie ili vivos kaj kantas.

*Purigo de bird-alloga instalaĵo*







La aŭtoro

# KIAL KAJ KIEL MI VOLAS ESPLORI LA ĈINAN ESPERANTO-MOVADON

SLAVA GÄERTNER (FR Germanio)

Kiam mi renkontiĝis kun membroj de la ĉina delegacio dum la Universala Kongreso en Augsburg, ili demandis min, kial mi okupiĝas pri la ĉina Esperanto-movado. Tiu ne estas nova demando al mi, ĉar ankaŭ miaj kunstudentoj jam ofte demandis min pri tio. Tial mi nun volas iom rakonti, kiel mi komencis mian okupiĝon pri tiu temo kaj kial mi volas daŭrigi mian studadon.

Jam antaŭ kvin jaroj mi komencis okupiĝi pri la historio de Esperanto en Ĉinio. Tiam en somera semestro 1980 mi partoprenis seminarion pri anarkiismo en Ĉinio, kiu estis okazigita en la instituto pri orientaziaj lingvoj de la universitato de München. En tiu seminario ni legis tekstojn, kiuj estis verkitaj de ĉinaj anarkiistoj, kiuj studis en Francio kaj Japanio en la komenco de tiu ĉi jarcento. Inter la temoj, kiujn la profesoro proponis al la studentoj, ankaŭ troviĝis la temo "Anarkiismo kaj Esperanto". Tiu temon mi elektis, ĉar ĝi ŝajnis al mi la plej interesa kaj eksterordinara studobjekto. Mi ankaŭ decidis studi pri tiu temo, ĉar mi jam pli frue okupiĝis pri Esperanto kaj planlingvoj.

Post kiam mi estis fininta mian verkaĵon por tiu seminario, la profesoro diris al mi, ke mi daŭrigu mian studadon pri tiu temo por la magistra ekzameno. Pro tio mi veturis al Vieno en septembro 1981 kaj vizitis la Internacian Esperanto-Muzeon, kiu estas sekcio de la Aŭstria Nacia Biblioteko, por informiĝi pri materialo pri Esperanto en Ĉinio. Dum mia restado en la muzeo mi trafolumis kelkajn malnovajn ĉinajn Esperanto-gazetojn, interalie la tre famajn revuojn "La Verda Lumo", kiu ekde 1922 aperis en Shanghai dum pli ol dek jaroj kaj "La Mondo", kiu estis la plej grava ĉina Esperantorevuo en la tridekaj jaroj. Tiu vizito en la Internacia Esperanto-Muzeo estis tre interesa por mi kaj instigis min al plia studado. En 1981 mi ankaŭ komencis korespondi kun ĉinaj esperantistoj kaj laŭ konsilo de mia Shanghai-a korespondamiko mi skribis al sinjoro Hou Zhiping, kunlaboranto de la redakcio de "El Popola Ĉinio", kiu ĉefe sin okupas pri la historio de la ĉina Esperanto-movado, por ankaŭ akiri informojn pri la nuna disvolviĝo de Esperanto en Ĉinio. Intertempe mi jam multe lernis pri la historio de la ĉina Esperanto-mo-

vado per legado de la revuo "La Mondo", la organo de Ĉina Esperanto-Ligo, kiu aperas ekde 1981. Tiun interesan revuon sinjoro Hou Zhiping afable donacas al mi kaj tiel subtenas mian laboron. Dum mia studado ankaŭ helpis al mi profesoro Ye Fengzhi, kiu dum tri jaroj gvidis kursojn pri la ĉina lingvo en nia universitato.

Ĝis nun mi ĉefe studis la komencon de Esperanto en Ĉinio. La unuaj ĉinoj, kiuj lernis Esperanton estis studentoj, kiuj komence de tiu ĉi jarcento studis en Francio. Ili precipe ŝatis la regulan gramatikon kaj la sisteman vortfaradon de Esperanto, ĉar tiuj ecoj kaŭzas la relativan facilecon de la lernado kaj praktikado de la lingvo. Du karakterizaj trajtoj de ilia poresperanta aktivado estis la supertakso de la funkcio de Esperanto, kiu montriĝis per ilia propono anstataŭigi la ĉinan lingvon per Esperanto, kaj la espero, ke ili povus studi okcidentan sciencon pere de Esperanto kaj tiel antaŭenigi la evoluon kaj modernigon de Ĉinio, kvankam en tiu tempo ekzistis nur malmulte da sciencaj verkoj en Esperanto. La merito de tiuj

ĉinaj studentoj, kiuj studis fremdlande, estas, ke ili sukcesis konatigi Esperanton al siaj samlandanoj en Ĉinio.

Alia grava kontribuo al la devastigo de Esperanto en Ĉinio estis la diskutado pri mondlingvoj en la gazeto "Nova Junularo", kiu okazis en la jaroj 1916 ĝis 1919. Dum tiu diskutado oni traktis la aplikeblecon de universala lingvo kaj en la funkcio de helplingvo kaj kiel anstataŭaĵo por la ĉina lingvo kaj por naciaj lingvoj ĝenerale. Aliaj demandoj pri kiuj la partoprenintoj de tiu diskutado debatis, estis la taŭgeco de Esperanto por la studado de okcidenta scienco, la rolo de Esperanto kiel ponto al aliaj fremdaj lingvoj kaj la ebleco enkonduki ĉinajn vortojn en Esperanton per tradukado el la ĉina literaturo. Tiu debato ne nur estis limigita je la utilo de Esperanto, sed oni ankaŭ diskutis pri la ĉina lingvo kaj la perspektivoj por ties reformo kaj simpligo.

Krom tiu komenca tempo, kiam progresema studentoj enkondukis Esperanton en Ĉinion kaj tiel kreis la kondiĉojn por la unua diskutado pri Esperanto en Ĉinio, restas ankoraŭ multe da esplorindaj demandoj pri la devastigado kaj aplikado de Esperanto en Ĉinio. Cetere estas notinde, ke jam antaŭ la diskutado pri Esperanto en la gazeto "Nova Junularo" ekzistis Esperanto-asocioj kaj grupoj en kelkaj lokoj de Ĉinio. Membroj de tiuj grupoj organizis Esperanto-kursojn kaj lerngrupojn kaj ankaŭ jam publikigis la unuajn ĉinajn Esperanto-gazetojn.

Koncerne la pluan evoluon de la ĉina Esperanto-movado post la periodo de la enkonduko de Esperanto en Ĉinion, oni povas studi kelkajn diversajn aspek-

tojn. Necesas konstati ekzemple, kiam kaj kie Esperanto-asocioj estis fonditaj, kiuj Esperanto-gazetoj aperis kaj kiu kunlaboris kun ili, pri kiuj temoj la kunlaborintoj verkis artikolojn kaj pri kiuj aliaj aferoj sin okupis tiuj, kiuj aktivis por Esperanto. Aparte interese estas eltrovi, kiel la pritakso de Esperanto kaj la celoj de ties aplikado en Ĉinio ŝanĝiĝis dum la evoluo ekde la komenca tempo ĝis hodiaŭ.

Alia esplorinda kampo estas la kontribuo de fremdlandaj esperantistoj al la historio de la ĉina Esperanto-movado kaj la kontaktoj de ĉinaj esperantistoj kun alilandaj esperantistoj kaj Esperanto-asocioj. Esperanto ankaŭ ludis gravan rolon kiel lingvo por tradukado kaj de fremdlanda literaturo ĉinen, kaj de ĉina literaturo alilingven. Tradukante fremdlandan literaturon, ĉinaj tradukistoj ofte uzis, krom la originala teksto, ankaŭ la esperantan tradukon kaj ankaŭ kontaktigis esperantistojn de la respektivaj landoj por havigi al si pliajn informojn. Oni ankaŭ uzis Esperanton por konigi kelkajn verkojn de la ĉina literaturo al la tutmonda esperantistaro. Precipe grava karakterizaĵo de la ĉina Esperanto-movado estas ties interligo kun la movado por la reformo de la ĉina skriba lingvo. En tiu movado kunlaboris multaj esperantistoj, verkante tekstojn pri la problemo de la latinigo de la ĉina skribo. La unuaj tekstoj, kiuj traktis proponojn por la latinigo de la ĉina skribo, estis publikigitaj en Esperanto-gazetoj.

Pliaj interesaj temoj por studado estas la aplikado de Esperanto dum la tempo de la milito, la reorganizado de la ĉina Esperanto-movado post 1949, la establo de la revuo "El Popola Ĉinio"

kaj la plua historio de Esperanto en la Ĉina Popola Respubliko ĝis la nova ekvigliĝo de la ĉina Esperanto-movado antaŭ kelkaj jaroj.

Nun la situacio de Esperanto en Ĉinio estas tre bona, ĉar la Esperanto-movado estas subtenata de la ŝtato. Precipe la multaj junuloj nun lernantaj en Esperanto-kursoj donas multpromesan perspektivon al la estonta devastigo de Esperanto en Ĉinio. Al tiuj bonaj kondiĉoj por Esperanto ankaŭ kontribuas la decido de la Eduka Ministerio, kiu ebligas al studentoj elekti Esperanton kiel fakon por studado kaj ekzameno en la universitato.

La rapida kaj sukcesa disvolviĝo de la ĉina Esperanto-movado en la pasintaj kvin ĝis ses jaroj vekis la atenton kaj admiron de la tutmonda esperantistaro kaj pliiĝis la interesiĝon de alilandaj esperantistoj por la historio de la ĉina Esperanto-movado, ĉar tiu nuna bona evoluo ja devas havi bazon, jam kreitan en antaŭaj jarcentoj, kaj tradicion, al kiu ĝi rilatas.

Al la esploro de la historio de la ĉina Esperanto-movado mi volas kontribui, ĉefe per studado kaj tradukado de tekstoj el malnovaj ĉinaj esperanto-gazetoj. Ankaŭ estonte mi volas verki pri mia studado kaj de tempo al tempo mi certe sendos artikolon al "El Popola Ĉinio". Mi estas feliĉa, ke mi havis la ŝancon konatiĝi kun membroj de la ĉina delegacio, ĉar tiel mi povis diskuti pri mia studado kun redaktoroj de "El Popola Ĉinio". Ili ankaŭ tre interesiĝas pri la historio de Esperanto en Ĉinio, kaj ni opinias, ke estas plej bone kunlabori kaj interŝanĝi informojn. Mi dankas al la ĉinoj, ke ili kuraĝigis min daŭrigi mian studadon pri tiu temo.



**ĴUS APERIS**

# **ŬANG GUJ KAJ LI ŜJANGŜJANG**

de LI ĜJI

**ESPERANTIGIS LAŬLUM**

Eposo pri amhistorio de paro da mizeraj kamparanoj okazinta ĉirkaŭ la jaro 1930. La verko sukcese modlis la du vekigintajn kamparanojn, realisme spegulas la tiaman kamparanan vivon, ilian deziron, batalon kontraŭ la subpremantoj, kaj puran amon. La verko estas verkita en formo de ĉina popolkanto. La lingvo aromas per ĉarmo de simpleco kaj multaj trafaj komparoj artisme reliefigis la enhavon. La originalo unue publikiĝis en 1946, kaj estis plurfoje reeldonita. Ĝi markis la komenciĝon de nova stadio de la ĉina moderna poezio, kies ĉefa reprezentanto fariĝis ĝia aŭtoro.

Li Ĝji (1922-1980) estis vicprezidanto de la Ĉina Verkista Asocio, kaj ĉefredaktoro de la literaturaj gazetoj "Poezio" kaj "Popola Literaturo". «Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang» estas lia ĉefverko.


**Formato: 148 × 210mm 58pĝ.**

**Prezo: £1,55 US\$2,85**

**Numero: 10-Es-71S**

**Mendu ĉe: Libroservo de UEA  
Perantoj de EPC**

**aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de  
Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio,  
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**



**INTERVIDIĜO DE  
JAPANAJ KAJ ĈINAJ  
ESPERANTISTOJ**

La 30-an de aprilo s-ro Nisigawa Toyozo, prezidanto de la Takatsuki-a Esperanto-Societo de Japanio, kaj s-ino Takeuti Tomiko vizitis la ĉinan urbon Ĉangĝoŭ kune kun la vizitgrupo de la Takatsuki-a Asocio por la Amikeco inter Japanio kaj Ĉinio kaj kunsidis kun esperantistoj de la Ĉangĝoŭ-a Esperanto-Asocio, kiu donacis silkan flagon al la japanaj amikoj. Akompanate de Ĝang Ĝenĝi, prezidanto de la Ĉangĝoŭ-a Esperanto-Asocio, la gastoj vizitis Tjanning-templon, Jiĝoŭ-pavilonon kaj la Geknaban Domon. Post kiam la japanaj geamikoj alvenis al Pekino en la 1-a de majo, ili intervidiĝis kun laborantoj de EPC-redakcio kaj la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, kune vizitis Ĝing-

ŝan-parkon kaj interŝanĝis donacetojn.

**ESPERANTO EN HUTUBI**

Hutubi estas gubernio de Singĵang, unu el la aŭtonomaj regionoj de Ĉinio. Novembro de 1985 la gvidaj departementoj de propagando, scienco, higieno kaj eduko kune subskribis cirkuleron kaj disdonis ĝin al ĉiuj siaj subaj organizoj. Oni informis tion per fadena disaŭdigo. Post ne-longe tieaj esperantistoj preparis Esperanto-kurson. Dum tri tagoj sin anoncis pli ol 100 personoj, inter kiuj estis junuloj hanaj, hujaj, ujuraj, kazaĥaj, mongolaj kaj rusaj. En la kurso lernis ankaŭ vicguberniestro, vicprezianto de la Scienca kaj Teknika Asocio de la gubernio k.a.

**EKSPOZICIO "PER  
ESPERANTO EN ĈINIO"  
EN JUGOSLAVIO**

De la 17-a ĝis la 25-a de marto 1986 okazis malgranda ekspozicio "Per Esperanto en Ĉinio" en la Nacia Biblioteko de Sid. Jugos-

lavio. La ekspozicio konigis la ĉinan Esperanto-movadon per pli ol 100 ĉinaj pentraĵoj, fotoj, Esperantaj eldonaĵoj kaj artaĵoj. En la inaŭguro oni deklamis ĉinajn poemojn kaj aŭdigis ĉinan muzikon. La lokaj radiostacio kaj ĵurnaloj raportis tion.

Veterana esperantistino s-ino Cvetanka Tubić liveris la ekspoziciaĵojn, kaj laboristino de la urba biblioteko partoprenis en la pre-parado.

S-ino C. Tubić estas malnova leganto de EPC kaj vizitis Ĉinion en marto 1980. En 1983, kiam la Ĉina Esperanto-delegacio vizitis Jugoslavion, ŝi afable akceptis la ĉinajn gesamideanojn. Por kulturi esperantistojn, ŝi gvidas Esperanto-kurson, diskonigas Ĉinion kaj diligente laboras por la amikeco inter la esperantistoj de Ĉinio kaj Jugoslavio.

**TELEVIDA ESPERANTO-  
KURSO KREATA EN  
JUGOSLAVIO**

Inter la planoj de UEA por la Jubilea Jaro troviĝas ankaŭ la strebado al enkonduko de Esperanto-kurso en laŭeble plej multajn televidojn en la mondo. Tamen ĝis nun malmulto estis farita sur tiu kampo. La kaŭzo de tio estas, ke unuopa landa asocio ne estas sufiĉe forta por krei TV-kurson sur profesia nivelo.

Post interparolo kun s-ro Tibor Sekelj la jugoslava TV konsentis produkti profesion Esperanto-kurson konsistantan el 24 lecionoj po 30 minutoj, taŭgan por internacia uzo. Ĉiu leciono instruos vortojn pri aparta temo: urba trafiko, familio, hotelo, trajno, muzeo, farmbieno ktp., kaj ankaŭ pritraktos sisteme gramatikajn erojn.

Tamen, al la jugoslava TV mankas sufiĉe da mono por tiel grandioza kaj nobla entrepreno. Tial ĝi nepre deziras havi "kunproduktantojn" en aliaj landoj, aŭ anticipe vendi kopiojn kaj prezent-

*Ĉinaj kaj japanaj esperantistoj en Ĉangĝoŭ*







*Membroj de Esperanto-kurso en Brazilo, kies duono estas abonantoj de EPC*

rajton en laŭeble plej multaj landoj. Tiaj kunproduktantoj aŭ antaŭaĉetantoj plejofte estos televidstacioj, tamen eblas ankaŭ, ke landa asocio aŭ aparta grupo de esperantistoj kolektas la necesan sumon por antaŭpagi sian kopion de la kurso kaj la rajton ĝin prezenti. Ĉiuokaze la landaj asocioj kaj la kompetentuloj en ĉiuj landoj estas petataj kunlabori en tiu ĉi granda projekto, turnante sin al la televidstacio de sia lando, aŭ fondante agadgrupon, kiu tion

prizorgos, aŭ kreas la monan bazon por la realigo de nia multjara revo.

#### **INTERNACIA SCIENCA SIMPOZIO**

En Zagrebo okazis la 5-an kaj la 6-an de aprilo 1986 la Internacia Scienca Simpozio kun la temo "La Rolo de Esperanto-movado en la Porpaca Agado en la Mondo" kiel kontribuo al la Internacia Jaro de la Paco. La simpozion partoprenis 17 referantoj el Aŭstrio, FR

Germanio, Svislando, Hungario, Bulgario kaj Jugoslavio. En la simpozia malfermo parolis nome de UEA d-rino Flora Szabo-Felso, nome de la Jugoslavia kaj Kroatia Esperanto-Ligoj Zlatko Tišljariĉ kaj nome de la Kroatia Porpaca Ligo d-ro Vjekoslav Cvrliĉ. La celo de la simpozio estis duobla: unuflanke pristudi la rolon de Esperantomovado en la porpaca batalo kaj vidi, kian rolon ĝi povus havi estonte, kaj aliflanke analizi la fenomenon de la "interna ideo".

#### **INTERNACIA ASOCIO DE HANDIKAPITAJ ESPERANTISTOJ (IAHE)**

eldonas specialigitan revuon:

### **VOĈO DE HANDIKAPULOJ**

La celo de de tiu ĉi revuo estas aŭdigi voĉon kun fizikaj malavantaĝoj, ne por plendi, sed por esprimi kreivecon, optimismon, amon kaj homan fratecon kaj humanecon.

Redaktas: S-ro Dušan Adnadj

Jarabono: 5.-US dol. aŭ egalvaloro en nacia valuto, pagebla al nia konto ĉe UEA sub kodo: Voch-o aŭ per internacia poŝtmandato al nia adreso: "Voĉo de Handikapuloj" 56227-Borovo, Ŝkolska ul. 25, Jugoslavio.

# Tri romanoj de István Nemere

En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitajn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekompencas pro la kontribuoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj meĉiartajoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

La Red.

**LA BLINDA BIRDO** Formato: 14 × 20 cm. 118 p. Prezo: 15 gld.  
**FEBRO** Formato: 14.5 × 20 cm. 131 p. Prezo: 15 gld.  
**LA MONTO** Formato: 14 × 20 cm. 166 p. Prezo: 16 gld.  
 Ĉiuj tiuj tri originalaj romanoj de István Nemere estas eldonitaj de la Hungara Esperanto-Asocio kaj mendeblaj ĉe ĝi (adreso: Budapeŝt, Pf. 193 H-1368, Hungario).

En la firmamento de la Esperanta literatura mondo, István Nemere aperis kiel aparte brila stelo, kies radioj jam altiris la atenton de multaj legantoj kaj rikoltis admiraĵojn de amantoj de literaturaĵoj. Post la apero de lia novelaro "La Naŭa Kanalo", sciencfikcia romano "Fermita Urbo" kaj la prieksfakista romano "Sur Kampo Granita", sekvis liaj aliaj tri romanoj supre menciitaj. "La Blinda Birdo" eĉ gajnis la honoran titolon "La Libro de la Jaro 1983". Kaj "Hungara Vivo" en sia 6-a numero de 1985 informas nin, ke aperos en 1986 aliaj kvar romanoj de I. Nemere, nome "Alta Akvo", "Serĉu Mian Songon", "Terra" kaj

"Vivi Estas Dangere", krom "La Trezoro", kies ĉapitroj sinsekve aperas en "Hungara Vivo". Tia fekundo ja estas fenomeno ĉe la esperantistoj-verkistoj. La lastajn tri aperintajn romanojn mi tralegis en unu spiro kaj mi estis forte impresita de la talento de nia diligenta verkisto.

**LA BLINDA BIRDO** temas pri batalo kontraŭ rasa diskriminacio praktikata de blankuloj kontraŭ nigruloj. S-ro Sven Viborg, verkisto de eŭropa lando Skandio, konatiĝis kaj amikiĝis kun nigruloverkisto Govan Dyebo, kiu ŝtele forlasis sian patrolandon Suda Respubliko en Afriko kaj ĉeestis kun Sven Viborg internacian verkistan konferencon en Eŭropo. Pro sia kontraŭregistara sinteno Govan Dyebo estis enkarcerigita post hejmen-reveno. Informiĝinte pri tio, Sven Viborg flugis al la Suda Respubliko por liberigi sian amikon. En la komenco, S. Viborg provis doni helpon laŭleĝe, tamen li vidis, ke neniu registara instanco pretas helpi la viktimojn de rasa diskriminacio. Fine li kontaktiĝis kun partizanoj kaj kune kun ili forprenis, per ruzo kaj pafiloj, Govan Dyebo el la ungoj de la registaro, je la kosto de la vivo de unu brava partizano. Govan Dyebo estis liberigita, tamen grave malsana pro la torture vunditaj gamboj, kiuj putriĝis pro manko de ĝustatempa medicina helpo. Oni devis tuj amputi liajn gambojn en la partizana tendaro en najbara lando kaj la operacio ne sukcesis. Govan Dyebo mortis kaj estis enterigita kiel heroo. Post pli profunda kono pri la situacio, Sven Viborg revenis al

sia hejmlando kaj komencis aktive helpi la partizanojn per medikamentoj.

La strukturo de la romano estas nekompleksa: ĝiaj sep ĉapitroj kun iom da enmiksita retrospektivo rakontas al ni la proceson de la okazajoj kun streĉa etoso de detektiva romano. Per sia lerta plumo la aŭtoro eksponas la rasan diskriminacion, unu el la naŭzaj abscesoj de la homaro, kaj instigas la legantojn batali kontraŭ ĝi. Tiu "Libro de la Jaro 1983" kredeble ludos aktivan rolon dum jaroj por konduki la legantojn al pripensoj pri tiu problemoj kaj al aktivado kontraŭ rasisma diskriminacio.

**FEBRO** estas am-romano kun karakterizaĵoj de psikologia kaj detektiva romano. Bela virino Anna, kun aĝo de pli ol tridek jaroj, estas edzino nefeliĉa de sterila inĝeniero. Ŝi kokris sian edzon kaj grave diĝinte postulis de li konsenton pri ekcedziĝo en nokto, kiam ŝia amato forestis eksterlande. En la sekvanta tago oni trovis ŝin morta kaj post nekropsia ekzameno far policejo, oni deklaris, ke ŝi memmortigis sin. Sed ŝia amanto kredis, ke ŝi estis murdita de la edzo. Li persekutadis la inĝenieron kaj fine pelis lin al policejo por konfesi sian krimon. En erupcio de amapasio, ofte blindiĝas la racio. "Febro" de amo povas feliĉigi, kaj tamen ankaŭ ofte malfeliĉigas, kaj eĉ murdas. En la "Febro" de István Nemere, unuflanke petole flirtas Kupido kaj tiklas amoro, aliflanke rikanas kaj minacas la skeleta Morto. Ne maloftaj estas tiaj kazoj en la homa socio. Kia-





Tri romanoj de István Nemere

maniere eviti la stultaĵojn en "Febro" de amo? Jen la problemo, pri kiu la verkisto volas nin atentigi.

La historio de la "Febro" estas tiel aranĝita, ke ĝi estas unua dividita en du partojn, poste tiuj duonoj estas diserigitaj kaj intermiksita laŭ kronologia ordo sen interligaj frazoj. Per tia aranĝo, eble la aŭtoro intencas emfazi la duflankecon de la amo: la miela amo kaj la murda hororo. Kvankam tio iom penigas la legantojn devigante ilin rememori pri la antaŭa koneksa parto de la transsaltanta rakonto, tamen ĝi bone efikas por fortigi la impreson pri la okazaĵoj.

**LA MONTO** signifas ŝajne noblajn altaĵojn, laŭ mia kompreno, pri kiu la aŭtoro volas atentigi nin. Temas pri travivaĵoj de majoro, kiu ricevis la taskon esplori pri kvar soldatoj malaperintaj en milito. Por fari enketadon, li suriris altan monton, sur kiu vivas izolita grupo da homoj, kiuj rilatiĝas unuj al aliaj kiel membroj de granda familio. Dum sia kelktaga restado inter la montanoj, la majoro trovis, ke ili estas homoj laboremaj, sinceraj kaj gastamaj, tamen evitas liajn demandojn pri la kvar malaperintaj militistoj. Per iom da ruzo, fine la majoro sukcesis akiri

informojn detalajn pri la militistoj malaperintaj: Ili venis sur la monton, estis gastigataj, rifuzis perlabori siajn vivbezonaĵojn kiel la aliaj loĝantoj, devigis la montanojn ilin vivteni, kaj ili ne nur vivis parazite sed eĉ perfortis plurajn virinojn. Iom post iom akriĝis la kontraŭdiro inter la paŝtiltenantoj kaj la pacamaj montanoj kaj fine komenciĝis vivmorta luktado. Unu el la soldatoj deziris forlasi la kolegojn kaj estis pafmortigita, sed je tio mortis ankaŭ la murdinto. La ceteraj du estis mortigitaj de la montanoj post viktimiĝo de unu amata frato de ili. Post la esplorado, la majoro fariĝis simpatia al la izolaj laboruloj pacamaj kaj decidis fari raporton favoran al ili.

Tiu ĉi romanon oni povus klasifiki kiel verkon porpacan, ĉar ĝi montras al ni, ke oni devas batali kontraŭ la parazitoj kaj perfortaj maljustaĵoj por teni la pacon. En tiu ĉi jaro por paco do certe tiu ĉi romano ludos sian aktivan rolon inter la esperantistoj, kiuj per ĉiuj klopodoj celas defendi la belan pacon minacatan en nia rapide progresanta mondo.

La strukturo de tiu ĉi romano estas plej senartifika, nur kun kelkaj intermetitaj paragrafoj de rememoroj pri pasintaĵoj. Per sia kronologia rakontado, la romano

streĉe tenadas la intereson de la leganto kaj enverŝas en lian kapon la ideojn de la aŭtoro eron post ero.

Leginte la tri romanojn de I. Nemere, mi volas diri, ke la muzo de la diligentulo ne tiel multe sin dediĉas por amuzo, ke la verkisto estas ne nur fekunda, sed ankaŭ sufiĉe profunda. Mi esperas, ke li sin dediĉos al pli penetriva traktado de la gravaj problemoj de la homa socio kaj per tio pentros la Esperantan literaturon per pli brilaj koloroj kaj levos ĝin al pli alta nivelo.

Kion mi diru pri la lingvaĵoj de la tri romanoj? La lingvo de I. Nemere ne nur klaras kaj fluas, sed ankaŭ viglas per ondetoj de freŝaj sukaj esprimoj. Jen specimenoj: en la orelo la sango kuregas krakante; lumo batis al liaj okuloj; la kelnerino tranĉas mian vidteron; en la arbaro ŝvebas la promeso de la somero; la stratoj estas plenaj de okulsagoj; neniam por ili ekŝaŭmas la vivo, ne alvenos ĉi tien la futuro, ĉiam nur la enuiga nuntempo migraĉas de mateno ĝis mateno; per sia tranĉilo li abunde tranĉis el la fromaĝo; ili estas honestaj, rektaj. Mi ankaŭ trovis, krom preseraroj, kelkajn diskutblaĵojn, kiel ekzemple: a. misuzo aŭ manko de la artikolo: la voĉo de (la) maljunulo (La Monto p. 45), Reman fermis (la) okulojn, (La Monto p. 86), G. kunligis la aper-turon de (la) sako (La Monto p. 149), la plej kompreneble (Blinda Birdo p. 39); b. misuzo de vortoj: la vespero kore **konsternigas** min (Febro p. 96), kiel ili **ŝprucas** la akvon (Febro p. 118), io **teruriga** (Febro p. 113). Plibonigenda estas la ofseta preso, ĉar kelkaj paĝoj estas neklare presitaj. Ĉio menciita ne malhelpas la legadon, mi rimarkigis pri tio kun deziro al la dankindaj verkisto kaj eldonistoj pli grandajn sukcesojn en la estonto.

Recenzis Laŭlum

# “KURACISTO” EN VAGONARO

La 19-an de marto ekspreso ekveturis de la urbo Harbin al Pekino. Post nelonge oni aŭdis maltrankvilan voĉon el mikrofono de la vagonaro: “Iu pasaĝero en la 6-a litvagono subite malsaniĝis. Ni petas kuraciston rapidi al la vagono.”

Tuj poste, iu maldika homo kun okulvitroj kaj grizaj haroj ĉe la tempioj eliris el la 9-a litvagono, trairis du vagonojn kaj venis al la malsanulino.

La malsanulino estis pli ol 30-jara. Tiam ŝia vizaĝo estis pala. Ŝi kuntiriĝis kaj ĝemadis de doloro.

“Kie vi sentas doloron? Lasu min fari ekzamenon.” La “kuracisto” sin klinis, serioze ekzame-

nis la malsanulinon kaj demandis ŝin pri la historio de ŝia malsano. Kiam li konstatis, ke ŝi suferas de dismenoreo\*, li tuj etendis la fenestran kurtenon, kovris ŝin per lankovrilo, donis al ŝi sendolorigilon kaj konsilis al ŝi: “Ne malvarmumiĝu!”

Profundiĝis la nokto. La vagonaro silentis kaj la pasaĝeroj endormiĝis. Tiam la “kuracisto” refoje venis al la malsanulino. Kiam li sciis, ke ŝia doloro ankoraŭ ne mildiĝis, li diris al la kondukto per la decida voĉo: “Tuj informu la aferon al la sekvanta stacio Ŝenjang kaj petu de ĝi iom da medikamentoj.” Li foje-refoje diris al la kondukto: “Nepre veku min je la dua nokte, kiam la vagonaro atingos la stacion.”

Tagiĝis. La “kuracisto” ankoraŭfoje vizitis la malsanulinon.

“Dankon, doktoro! Mi ne sentas tiel fortan doloron,” emociiĝis tiu pasaĝero el Kantono. La “kuracisto” kun rido donis signon nedankindan kaj konsilis al ŝi ellitiĝi kaj malrapide moviĝi por fortigi la korpon kaj ne plu senti sin malbone ĉe la elvagoniĝo.

Kiam la vagonaro atingis Pekinon, la malsanulino facile elvagoniĝis. Sed ŝi ne sciis, ke la “kuracisto”, kiu sendolorigis ŝin, estas profesoro Ĉen Mingang, vicministro de la Sanprotekta Ministerio.

*\* Doloro ĉe virinoj dum la monata sangelfluo.*





# ĈINA ANTIKVA PIEDPILKADO

Ĉinio estas unu el la landoj, kiuj plej frue disvolvis piedpilkadon. En la Periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) piedpilcado jam estas unu el la rimedoj por trejni soldatojn. Oni faris pilkon el ledo kaj remburis ĝin per plumoj. Tiam jam okazis antagonisma konkurso inter du grupoj da soldatoj, ĉe kiuj estis kaj atako kaj defendo. Bedaŭrinde mankas al ni historiaj notoj pri tia konkurso.

En la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-24 p. K.) oni detale

skribis pri piedpilcado en armea trejnado. En la unuaj jaroj de la Okcidenta Han-dinastio estis "Nova Libro pri Piedpilcado" kun 25 ĉapitroj, konservita de la imperiestra familio. Ĝi estis la unua libro pri piedpilka tekniko en la mondo. Oni trejnis soldatojn per piedpilcado, por ke ili lertigu siajn manojn kaj piedojn kaj bone uzu siajn armilojn. Tiam jam estis granda piedpilka ludkampo nomata "piedpilka urbo" kun rektangula ĉirkaŭmuro. Ĝi estis ankaŭ trejnejo por armeo. Imperiesfro ofte venis


tien por rigardi piedpilkan konkurson kaj revui armeon.

La piedpilka ludkampo havis sur la orienta kaj okcidenta muroj po ses simetriajn rondajn truojn kiel golejojn. La du konkurantaj teamoj havis saman nombron da piedpilkestoj, unu golulon ĉe ĉiu golejo. Ĉiu konkurso havis juĝiston kaj asistan juĝiston, kiuj devis juste labori laŭ la reguloj.


La tiama piedpilka konkurso estis preskaŭ egala al la nuna. La konkursa pilko estis farita




*Kortega piedpilka ludkampo en Han-dinastio*



*Piedpilka konkurso en Han-dinastio por trejni soldatojn*



*Piedpilka ludkampo en Tang-dinastio*



*Piedpilka ludkampo en Jŭan- kaj Ming-dinastioj*

interne el urina veziko de besto kaj plenblovita per buŝo. La pilko eble estis la plej frua ŝveligita piedpilko en la mondo.

En Tang-dinastio (618-907 p. K.) furoris piedpilka ludo kaj amika piedpilka konkurso kaj eĉ aperis virina piedpilka ludo. La ludejo havis du golejojn, ĉiu kun du starigitaj bambustangoj ĉirkaŭitaj per reto.

En la lasta periodo de la Norda Song-dinastio (960-1127 p. K.) ŝanĝiĝis la formo de piedpilka konkurso. Oni uzis nur unu golejon altan je 10 metroj, kiu staris en la centro de la ludkampoj. La konkurso iris tiamaniere: la membroj de la du teamoj ludis ambaŭflanke de la golejo kaj atakis saman golejon. Se iu piedjetis la pilkon en la retotruon de la supra parto de golejo, li gajnis

poenton. Tia ludmetodo daŭris ĝis la 18-a jarcento.

En Song-dinastio estis premio kaj puno por la kortega piedpilka konkurso: la membroj de la teamo gajninta la ludon estis premiitaj kaj la estro de la teamo perdinta la ludon estis vipita kaj lia vizaĝo estis ŝmirita per flava kaj blanka pulvoroj.

Estis amika piedpilka konkurso sen golejo, kaj oni decidis venkon laŭ la arta piedpilkado kaj la nombro de elegantaj movoj.

En Ming-dinastio (1368-1644 p. K.) la pilkan vezikon oni pufigis per malgranda aeroblovido.

En la reg-periodo (1736-1795 p. K.) de la imperiestro Ĉjanlong de Ĉing-dinastio estis surglacia piedpilka konkurso, kiu igis la ludon pli interesa.



Sola golejo en Song-dinastio



Piedpilkado kun unu ludanto



Piedpilkado kun du ludantoj



Piedpilkado kun tri ludantoj



En Ĉinio estas kvin famaj montoj, nome, la orienta monto Tajŝan, la suda monto Hengŝan, la okcidenta monto Hŭaŝan, la norda monto Hengŝan kaj la meza monto Songŝan. Ili estas reprezentantoj de la famaj ĉinaj montoj kaj miniaturaj de la antikva civilizacio de Ĉinio pro siaj imponeco, superbaj pejzaĝoj, mirindaj legendoj kaj riĉaj historiaj objektoj.

Antikva ĉina legendo diras, ke la dio Pangu, kiu kreis ĉion en la mondo, falis surteren post sia morto. Lia kapo fariĝis la Monto Tajŝan, la piedoj — la Monto Hŭaŝan, la maldekstra kaj dekstra manoj — la suda Monto Hengŝan kaj la norda Monto Hengŝan, la ventro — la Monto Songŝan. Tial la antikvaj ĉinoj kultis la kvin montojn kiel diojn.

Tajŝan, la unua el la kvin famaj montoj, sin trovas en la me-

za parto de Ŝandong-provinco, ĝia ĉefa montpinto Juhŭangding 1 545 metrojn alta super la marnivelo alte staras sur la vasta ebenaĵo kaj montetaro. De antike Tajŝan-monto famiĝis pro sia imponeco, kaj estas rigardata kiel simbolo de grandeco, alteco kaj nefleksebleco kaj prifierinda por la ĉina nacio. Pluraj imperiestroj de Ĉinio persone venis al Tajŝan por fari grandan ceremonion kulti la ĉielon kaj teron, kaj tie konstruigis templojn kaj pavilonojn kaj starigis steleojn, kaj diverstempaj literaturistoj tie verkis poemojn. Nun tie ankoraŭ konserviĝas la templo Dajmjaŭ ĉe la montpiedo kaj multaj haloj, temploj, steleoj, surrokaj epigrafoj, ŝtonaj arkadoj, fera pagodo kaj aliaj antikvaĵoj sur la monto.


Por grimpi la monton estas la vojoj orienta kaj okcidenta, kiuj


kuniĝas ĉe la Mezĉiela Pordo sur la Montotalio. De tie al la Sudĉiela Pordo la vojo estas ĉiam pli kruta, apud la vojo troviĝas ferĉeno kunigita de feraj fosto por faciligi grimpadon de la turistoj. Por trairi la faman danĝeran vojon de "18 Zigzagoj" longan je nur unu kilometro oni devas grimpi ĉ. 1 600 ŝtonajn ŝtupojn. Nun de la Mezĉiela Pordo ĝis la Sudĉiela Pordo funkcias kabla ĉaro por transporti turistojn. Surgrimpite la montpinton oni povas aprezi multajn belegajn pejzaĝojn, inter kiuj la sunleviĝa aŭroro, sunsubira ĉielruĝo, la orrubanda Flava Rivero kaj la jadtelera nubaro estas kvar mirindaj spektakloj de la monto Tajŝan.

La suda monto Hengŝan situas en la meza parto de Hunan-provinco, ĉirkaŭ ĝia ĉefpinto Ĝuĵong 1 290 metrojn alta super la marnivelo troviĝas 72 grandaj kaj malgrandaj montpintoj. Ĝi estas fama pro siaj grandiozeco kaj beleco. En la antikva urbeto Nanjŭe ĉe la montpiedo troviĝas la templo Nanjŭe, la plej granda antikva konstruaĵaro en la provinco. Sur la monto prosperas antikvaj pinoj, ginkoj, raraj floroj kaj herboj, kio faras la medion bela kaj kvieta.

Por surgrimpi la Sudĉielan Pordon de la montpiedo oni devas piediri montvojon de 12 km., tie la monto dividiĝas en du partojn antaŭan kaj postan. Ju pli supre, des pli kruta fariĝas la vojo. Sur la pinto Ĝuĵong estas Ĝuĵong-halo. Ĉar la loko estas alta kaj vento forta, tial la halo estas konstruita el ŝtonaj muroj kaj feraj tegoloj. La Suno-rigarda Teraso sur la montosupro estas la plej alloga loko. En serenaj aŭtunaj tagoj oni povas tie ĝui belan scenon de sunleviĝo. La alta Ĝuĵong-pinto, profunda

*Pagodo en la templo Songjŭe*





*Antikvaj pinoj sur Hengŝan-monto*

Fanggüang-templo, ĉarma Sutro-konserva Halo kaj mirinda Akvokurtena Kaverno estas la kvar vidindaĵoj de la suda monto Hengŝan.

La okcidenta monto Hŭaŝan situas en la meza parto de Ŝenŝji-provinco. Ĝi frontas kontraŭ la Flava Rivero kaj dorse sin kroĉas al Ĉinling-montaro, ĝi allogas jam de antikve sennombrajn turistojn per siaj grandiozeco kaj kruteco. Nur unu montvojo kondukas de la montopiedo al la montosupro. Oni priskribas ĝian krutecon ofte per la vortoj "de antikve ekzistas nur unu vojo kondukanta al la kulmino de la monto Hŭaŝan". Ĝi havas kvin montpintojn, la suda estas la plej alta kun alteco de 2 200 metroj super la marnivelo. Inter la pintoj orienta, suda kaj okcidenta troviĝas malaltaĵo, kie estas templo kun puto ene. En pluva sezono ĝia akvo superfluas kaj torentas inter la pintoj orienta kaj okcidenta kaj formis akvofalon. Tio estas unu el la mirakloj de la monto. Sur la monto estas multaj temploj kun apartaj

arkitekturaj trajtoj konstruitaj laŭ la topografio.

La erozio en la pasintaj jar-miloj faris la rokojn mirindaĵoj. Per sia riĉa imago oni kunligis ilin kun multaj belaj mitoj kaj legendoj. Dank' al la prilaborado tie formiĝis ĉ. 80 vidindaj lokoj, kiuj donis al la monto Hŭaŝan misteran koloron.

La norda monto Hengŝan troviĝas en la norda parto de Ŝanŝji-provinco. Ĝi etendiĝas de nordoriente sudokcidenten, oriente kunligiĝas kun Tajhang-montaro, okcidente kun Janmen-pasejo, sude limtuŝas Utaj-monton kaj norde rigardas al Datong-baseno. Hengŝan-monto havas multajn montĉenojn, la ĉefpinto altas 2 017 metrojn super la marnivelo. Ĝia fama antikva konstruaĵo estas la Templo Pendanta. Ĝi estas granda vico da antikvaj konstruaĵoj kun domoj sidantaj unuj super aliaj. Ĝiaj pli ol 40 haloj kun ruĝaj muroj kaj griztegolaj tegmentoj kuŝas en artefaritaj kavernoj kaj sur traboj en surrokaj truoj kaj pendas sur

krutaĵo. La templo, kiu supre tuŝas la nubaron kaj malsupre rigardas al la profunda valo, impresas kiel ĉiela palaco. La haloj estas interligitaj per zigzagaj koridoroj kaj pendpontoj kiel labirinto. Rigardi malsupren estas vere vertiĝdona!

La meza monto Songŝan troviĝas en la meza parto de Henan-provinco kaj okcidente estas najbara al la antikva urbo Lŭo-ĵang, tial ĝi havas multajn famajn antikvaĵojn. Ĝi estas naskiĝloko de Ĉan-sekto de la ĉina budhismo. La fama Ŝaŭlin-templo ripozas en la sino de la monto. Songŝan konsistanta el du grandaj montoj etendiĝas 30 km. de oriento al okcidento kaj havas 72 grandajn kaj malgrandajn montpintojn. Ĝia plej alta pinto estas 1 500 metrojn alta super la marnivelo. Songŝan-pagodo ĉe la montotalio konstruita antaŭ pli ol 1 400 jaroj estas pli ol 40 metrojn alta. Ĝongjŭe-templo kun areo de 100 000 kvadrataj metroj estas unu el la plej fruaj taoismaj temploj en Ĉinio. La templo estis konstruita en la komencaj jaroj de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) kaj plurfoje ekspansiigita en postaj dinastioj. Sudoriente de Songŝan konserviĝas antikva observatorio de Ĉinio — la Gaŭĉeng-a Stelobservejo, konstruita en 1279, siatempe funkciis kiel observatoria centro de Ĉinio. Songŝan-akademio, Jingtjan-akademio de Henan, Jŭelu-akademio de Hunan kaj Bajludong-akademio de Ĝjangŝji estis kvar grandaj antikvaj akademioj de Ĉinio.

La kvin famaj montoj nun estas turismaj lokoj kaj malfermiĝis ankaŭ al fremdlandaj turistoj.



# Belaj mitoj kaj legendoj de la antikva Ĉinio

de MEJ ĜI

Same kiel en aliaj antikvaj civilizitaj landoj, frue en la tempo de la primitiva klana komunumo de Ĉinio naskiĝis multaj mitoj kaj legendoj plenaj de prisma fantazio kaj romantikeco.

Sed estis bedaŭrinde, ke la trezoro de la plej antikva tradicia folkloro ne estis komplete konservita, kio kontraste okazis en la antikvaj Grekio kaj Hindio. Nun oni povas trovi nur fragmentojn el antikvaj verkoj. La ĉefaj el tiaj verkoj estas "Libro de Montoj kaj Maroj" formita en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770-221 a. K.), "Hŭaj Nan Zi" verkita de Liŭ An (179-122 a. K.) de Han-dinastio, "Ĉuci", "Ĝŭangzi" k.a.

"Libro de Montoj kaj Maroj" temas ĉefe pri geografiaj scioj en folkloro, inkluzive de tiuj pri montoj, riveroj, nacioj, produktaĵoj, kuraciloj, kulto, ŝamanismo k.a., kiuj enhavas multajn prahistoriajn mitojn kaj legendojn. La 21 ĉapitroj de "Hŭaj Nan Zi" estas konservitaj nun. Ĝi estas eklektika verko kun nemalmultaj materialoj pri naturaj sciencoj. "Ĉuci", kun poemoj de Ĉju Jŭan (340-278 a. K.), la plej frua ĉina poeto, kiel la ĉefa enhavo, priskribas morojn kaj produktaĵojn en lokaj literatura formo, dialektoj kaj prononco de

Ĉu-regno (la nuna Hubej-provinco). "Ĝŭangzi" estas verko de filozofo Ĝŭangzi (369-286 a. K.) kaj aliaj en la Periodo de Militantaj Regnoj kaj verkita en formo de fabelo kun riĉa imago.

Multaj notoj en tiuj verkoj montris, ke la antikvaj ĉinaj mitoj kaj legendoj havas sorĉan belecon.

En "Hŭaj Nan Zi" estas mito pri ĉielriparado de Njuŭa. La le-



*Njuŭa ŝtopas la ĉielajn truojn.*

gendo pri diluvo temas pri la origino de la homoj. Kiam la mondo estis en ĥaoso, furiozis diluvo, incendio kaj rabobestoj. Poste, Njuŭa kvietigis la diluvon, estingis la incendion, fandis kvin-kolorajn ŝtonojn por ŝtopi la ĉielajn truojn, dehakis la kvar piedojn de giganta testudo kaj per ili subtenis la ĉielon en kvar ekstremoj. Post tio, ŝi faris homojn el argilo, kaj tiamaniere aperis la homoj kaj la universo. Antikvaj libroj priskribis, ke Njuŭa estis diino kun homa kapo kaj serpenta korpo. En la mitologia mondo Njuŭa estas rigardata kiel diino ĉiokulturanta kaj homama.

La priskriboj de la suno, luno, vetero, astroj, animaloj kaj vege-

taloj en la mitoj kondukas la homojn en alian mirindan medion. Ekzemple, la mito pri la suno priskribas, ke en la loĝejo Tangu de la sunoj kreskas la giganta arbo Fusang, sur kiu loĝas la dek sunoj. Ĉiutage ilia patrino Ŝiĥe veturigas unu el ili al diversaj lokoj, kaj tiele la suno leviĝas kaj subiras.

La mitoj prezentas multajn heroojn, kiaj Hŭangdi, Jandi, Gun, Ju, Ji k.a. Tiuj herooj estis enkorpiĝo de saĝo kaj forto en la okuloj de la popolo. Ili estis ĉiopovaj. Jandi kaj Hŭangdi estis fratoj sampatrinaj kaj regis po duonon de la mondo. Jandi estis dio de la suno kaj instruis al la homoj terkulturadon kaj ser-

ĉadis herbdrogojn por kuraci homojn. Tial li estis nomata ankaŭ dio de terkuturo kaj dio de medikamento. En antikva libro estas notita, ke li mortis pro toksigo en gustumado de herbdrogoj. Hŭangdi estis tre impona en la mito. La ĉapitro "Norda Dezerto" de "Libro de Montoj kaj Maroj" priskribas la animskuan batalon inter Hŭangdi kaj aliklana estro Ĉijoŭ: "Ĉijoŭ levis batalon kontraŭ Hŭangdi, kaj tiu lasta ordonis Jinglong rebati Ĉijoŭ en Ĝjiĝoŭ. Jinglong venigis grandan kvanton da akvo, dum Ĉijoŭ venigis la diojn de vento kaj pluvo, kaj tiuj ĉi levis ŝtormon. Hŭangdi sendis diinon Ba kaj la ŝtormo estis ĉesigita kaj Ĉijoŭ mortigita." Eble en la prahistorio ekzistis Jandi kaj Hŭangdi, kiuj estis eminentaj tribestroj en la klana socio. Poste, ili estis prenitaj kiel la prapatroj de la ĉina nacio, tial la ĉinoj nomas sin posteuloj de Jandi kaj Hŭangdi.

En la mitoj Gun kaj Ju estis herooj subigintaj diluvon. La ĉapitro "Hajnejĝing" de "Libro de Montoj kaj Maroj" priskribas, ke por bari la diluvon Gun ŝtelis de la Dio "ŝjiĝang" (argila bulo povanta mem kreski senĉese) kaj pro tio li estis mortigita. Ju, la filo de Gun daŭrigis la aferon de sia patro. Li faris sin urso kaj traboris la monton por forkonduki la diluvon. En la batalo kontraŭ la diluvo li trifoje preterpasis sian hejmon sen eniri. Kvar tagojn post lia edziĝo al filino de Tuŝan, naskiĝis lia filo Ĉji. Sed li ne havis tempon por karesi sian bebon. La vivecaj detalaĵoj faris la imponajn mitojn fidindaj.

Same kiel la mitoj pri Gun kaj Ju, vaste cirkulas ankaŭ la legendo "Faligo de Naŭ Sunoj Far Ji per Pafarko": La legendo diras, ke iun tagon la dek sunoj



*Ji pafaligas sunojn.*





*Cang'e flugas al la luno.*

loĝantaj sur la arbo Fusang samtempe kuris al la Ĉiela Palaco. Ilia faro alportis al la homa mondo katastrofan trosekecon. Kaj la dio sendis Ji paffaligi la sunojn. Ji paffaligis 9 sunojn kaj savis la homaron el la katastrofo. Rakontante pri Ji, ni devas mencii ankaŭ lian edzinon Ĉang'e. Malkontenta pri la vivo en la homa mondo, ŝi volis reveni al la Ĉiela Palaco. Ŝi ŝtelis kaj englutis la senmortigan pilolon de Ji kaj flugis en la Lunan Palacon.

Inter la multaj herooj estis tre ĉarma knabino, la plej juna filino de la suna dio Jandi. Iun tagon ŝi distris sin ĉe la Orienta Maro kaj dronis en ĝi. Post mor-

to ŝi fariĝis birdeto Ĝing'uej. Ŝi ofte portadis en la buŝo branĉetojn kaj ŝtonetojn de la Okcidenta Monto kaj ĵetis ilin en la maron por plenigi ĝin. La firma volo kaj persistemo de la malgranda kaj ĉarma spirito ĉiam emocias la posteulojn.

La antikvaj mitoj kaj legendoj de Ĉinio estas ĝermo de la romantika literaturo de Ĉinio. Multaj postaj verkistoj, influataj de la romantikeco de la mitoj kaj legendoj, ofte ĉerpis el ili materialojn por sia verko. Estas profunda la influo de la antikvaj mitoj kaj legendoj sur la posta literaturo.

Ilustraĵoj de **Ŝa Gengŝi**

## DU ANTIKVAJ

## MITOJ DE

## ĈINIO

### HOMKREADO DE NJUŬA

Kiam la mondo estis en ĥaoso, en ĝi ne estis homoj, kaj Njuŭa faris homojn el agrilo. La laboro estis tiel peza, ke ŝi ne povis ĝin elteni. Ŝi do trempis longan kaj dikan ŝnuron en koto, eltiris kaj svingis ĝin, tiam la koto falis teren kaj fariĝis homoj. La homoj modlitaj el argilo estis riĉaj, dum la homoj transformitaj el koto estis mizeraj kaj trivialaj.

### KŬAFU POSTKURAS LA SUNON

Sur vasta dezerto estis la monto Ĉengduzajtjan, en kiu vivis Kŭafu, kiu havis po unu flavan serpenton sur la oreloj kaj tenis po unu serpenton en la manoj. Li estis nepo de la dio de l' tero Hoŭtu kaj filo de Ŝin. Kŭafu trotaksis sian forton kaj intencis kuratingi la sunon. Li kuregis ĝis Jugu, kie subiras la suno, kaj suferis teruran soifon. Li kuris al la Flava Rivero kaj rapide eltrinkis la riveron. Li intencis trinki el la lago Daze en la nordo. Sed antaŭ ol li atingis la lokon, li mortis de soifo.

# REGO DE ĈIGONG-O

Ĉigong-o estas tradicia saniga metodo de Ĉinio. Ĝi povas fortigi la ekzercanton per sinteza ekzercado de la psiko kaj korpo. En Ĉinio estas skolo de la forta ĉigong-o, alte taksata. Kvankam ĝi havas efikon sanigan kaj kuracan, tamen ĝi celas ĉefe rivali per korpo sanga kaj karna kun metalo kaj ŝtono. Fakte, sub certaj kondiĉoj ĝi vere povas fari la homan korpon pli malmola ol ŝtono kaj ŝtalo. Ĉi tie ni konigas al niaj legantoj Hoŭ Ŝujing, kiu estas honorita kiel "reĝo de ĉigong-o" kaj posedas tian eksterordinaran kapablon.


## NEVUNDEBLA PER METALO KAJ ŜTONO

Hoŭ Ŝujing estas pli-ol-50-jara, ne altstatura kaj ordinara homo

je la unua vido. Sed senescepte ravitaj estis ĉiuj, kiuj spektis lian prezentadon.

En la lastaj jaroj Hoŭ vizitis dekkelkajn landojn por konigi la ĉinan fortan ĉigong-on al aliaj landoj. Li kun la Pekina Tradicia Luktarta Trupo vizitis Usonon 42 tagojn kaj prezentis sinsekve en ses urboj, inkluzive de Nov-Jorko, Vaŝingtono, Los-Anĝeleso k.a. Lokaj ĵurnaloj raportis pri lia prezentado sub la titoloj "Li fraprompis graniton per la kapo kaj ŝtonplaton per la kruro", "Mistera Fortegulo" kaj "Reĝo de Ĉigong-o".

Li prezentis al usonaj spektantoj sian superban arton akiritan dum dekoj da jaroj. En la prezenta halo plena de spektantoj




*Novembre de 1984 s-ro Hoŭ Ŝujing ricevis akademian ateston de la Universitato de Utaho en Usono.*

oni fiksas sian rigardon al la majstro en tradicie ĉinstila jako kun butonoj en la fronto. Li firme staris kaj koncentris sian atenton al absoluta kvieteco. Laŭ la mieno lia penso jam flugis ekster la halon. Apenaŭ li levis la manplaton, kiam ŝtonplato 5 cm. dika kaj 10 cm. larĝa tuj rompiĝis en du partojn. Tuj sekve, sin klinante, li frapis per la kapo ŝtonplaton dikan je

*La geedzoj Hoŭ Ŝujing frakasis ŝtonplatojn surkape junio de 1985 en la Unua Azia-Pacifika Festivalo okazinta en Vankuvero, Kanado.*

*S-ro Hoŭ Ŝujing (dekstre) instruas al vicprofesoro G.M. Martin sidan ĉigong-an ekzercadon kaj resanigis ŝin de mamkancero.*





*Hoŭ Šujing kun siaj familianoj kaj usona disĉiplo (la unua de maldekstre en la malantaŭa vico)*



*Urbestro de Vankuvero s-ro M. Harcourt donacas memorajon al Hoŭ Šujing (dekstre).*

10 cm. kaj ĝin rompis. Liaj piedoj estas pli kapablaj. Li rompis per unu piedfrapo ŝtonplaton 15 cm. dikan alportitan de du homoj, en du partojn. Li pli mirigis la spektantojn per siaj prezentoj "rompi ferstangon per la manoj" kaj "lancopiki la gorĝon".

Hoŭ, kun kruro metita sur benko, tenis per la manoj la du ekstremaĵojn de unu ferstango kun diametro de 4 cm. Subite li levis alten la ferstangon, kun laŭta krio, li forte frapis per ĝi la femuron maldike vestitan. Je tio la spektantoj kriis de miro. Antaŭ ol ili trankviliĝis, li jam facilmove stariĝis kun la du partoj de la rompita ferstango en la manoj.

"Lancopiki la gorĝon" estas unu el la superbaj teknikoj de la forta ĉigong-o. Tiu, kiu ne posedas altan lertecon, ne kuraĝas provi la lancopinton per sia gorĝo. Hoŭ estas plej lerta

en tiu prezentado. Li metis la lancopinton malsupre de sia gorĝo kaj la malmolan lignan tenilon de la lanco en kavon de stablo antaŭ si mem por ĝin fiksi. Premante la gorĝon al la lancopinto, li intensigis sian spiradon por produkti energion. Kun antaŭenmoviĝo de lia korpo la ligna tenilo komencis kurbiĝi. Kiam ĝi kurbiĝis je pli ol 90 gradoj, ĝi fine rompiĝis kun krakego. Kiam Hoŭ montris sian gorĝon al spektantoj, oni trovis neniun vundon sur ĝi krom malhelruĝa signo.

### **EMINENTAJ MAJSTROJ, TALENTAJ DISĈIPLOJ**

La eminenta ĉigong-arto de Hoŭ rezultis el lia pena ekzercado dum la pasintaj pli ol 40 jaroj.

Li devenis de Hebej-provinco. Lia patro estis vilaĝa ĉin-medicina kuracisto. Poste lia familio transloĝiĝis al la nordorienta

Ĉinio. Kiam li estis 7-jara, lia patro perdis la familianojn pro evito de soldatiĝo. Kondukate de la patrino, li, liaj frato kaj fratino almozetante venis al antikva templo sur Daĉingding-monto de Ĝjilin-provinco. En la templo vivis maljuna bonzo, kiu persvadis lian patrinon doni lin kiel sian disĉiplon. De tiam ili kune vivis ok jarojn almozetante. La bonzo lernigis al li budhisman ĉigong-on. En ĉiu ekzercado li frapis per la kapo muron, arbon kaj ŝtonon 300 fojojn pli kaj pli forte, aŭ permane rompis brikon, tegolon kaj ŝtonon pli kaj pli dikan. Por ekzerci lian pezaĵo-eltenadon, la majstro metis sur lin pezaĵojn, kiaj incensujo, tablo, ŝtonaj plato kaj muelilo. Post du-jara ekzercado li jam povis kuŝe porti sur si dek minutojn pezaĵon de pli ol 500 kilogramoj.

Kiam li estis 15-jara, li malfeliĉe disiĝis de la majstro en fuĝo





*Hoŭ Ŝujing rompas ŝtalan stangon per mano.*

de milito. Poste li vivtenis sin per prezentado de forta ĉigong-o.

Lia edzino Sun Sulan antaŭe estis aktorino de iu pekino-opera trupo de la Interna Mongolio, lerta en luktarto. Post la edziniĝo ŝi lernis de la edzo fortan ĉigong-on. Nun ŝi estas eminenta majstrino de forta ĉigong-o. Ili havas unu filinon kaj tri filojn, ĉiu kun superhoma kapablo. La 16-jara filino Hoŭ Ĉunŝjue ne nur povas kuŝe porti sur si ŝtonegon 1500 kg. pezan, sed ankaŭ estas lerta en malpeza ekzerco. Ŝi povas stari sur du kokovoj, ambaŭmane tenante po unu sitelon da akvo pezan je dek kg. La 15-jara filo Hoŭ Ĉjun povas teni per mano ardan ferbastoneton, sen brulvundo. Li ankaŭ povas prezenti spektaklon lasi la kvar membrojn tirataj de forto, kaj li mem restas senmova. La 12-jara filo Hoŭ Jong povas prezenti "Lancopiki

la gorgon". Eĉ la 6-jara filo Hoŭ Ŭej povas rompi ŝtonplaton per la kapo. Antaŭ nelonge oni faris koloran dokumentan filmon pri lia familio sub la titolo «Majstroj kaj Mirinfanoj» por konigi la fortan ĉigong-on. Lia familio partoprenis ankaŭ en la farado de la filmo «Ĉinaj Luktartoj».

### ĈIGONG-O NE ESTAS METAFIZIKO

Preskaŭ ĉiuj, kiuj rigardis la prezentadon de Hoŭ Ŝujing, demandis: "Kiom da forto li havas?" "Ĉu veraj estas liaj ekzercoj?"

La ĉina fama sciencisto Ĉjan Ŝjuesen montris: "Forta ĉigong-o temas pri mana rompado de ŝtonplato, nuda korpo kontraŭ glavo kaj hakilo. . . , kio povas esti klarigata laŭ teorioj de la modernaj sciencoj."

Ĉina forta ĉigong-o ekzistas inter la popolanoj de la antikveco. Dum la Periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770-221 a.K.) jam aperis ekzerco "Glavohaki Nudan Bruston", sed la ekzerco ne vundiĝis de akra glavo. Dum la Orienta Han-dinastio (25 a.K.-220 p.K.) sciencisto Ĝang Heng ensia verko menciis la ekzercon "Brusto en Kolizio kun Akraĵo", ankaŭ tio aludas la fortan ĉigong-on. En Tang-dinastio (618-907 p.K.) plimultiĝis notoj pri la forta ĉigong-o. Post Ming-dinastio (1368-1644 p.K.) budhismo kaj taoismo digis ĉigong-on kaj donis al ĝi misteran koloron. Multaj okcidentanoj konfuzas la ĉinan ĉigong-on kun la hindua jogo kaj nomas ĝin ĉina jogo.

En la 60-aj jaroj de la kuranta jarcento ŝanhajaj medicinistoj malkovris, ke la spira rapido kaj

korbato de la ekzercoj de ĉigong-o estas pli malrapidaj en malstreĉa kaj kvieta stato. Li konsumas multe malpli da oksigeno ol ordinaruloj kaj eĉ ol dormantoj. Lerta ekzerco spiras nur 1-2 fojojn ĉiunminute dum ekzerco. Hoŭ Ŝujing vere estas eminenta en ĉigong-o. Li spiras nur kvar fojojn ĉiuhore dum ekzerco. Li povas elteni forton de 2000 kg. 40 minutojn. Kiam 5-6 forteguloj frapas lian subventron per cilindra arbotrunko kun diametro de 50 cm., li restas senmova.

En la lastaj jaroj ĉinaj medicinaj laborantoj kaj sciencistoj intensigis la esploron pri ĉigong-o per modernaj sciencaj rimedoj kaj trovis nemalmultajn valorajn fenomenojn. Ili opinias, ke la korpo de homo povas produkti forton de 25 tunoj, se la muskoloj kuntiriĝas al sama direkto. Kiam Hoŭ frapas ŝtonplaton per la kapo aŭ rompas ferstangon per la manplato, la frapa rapideco estas kvin metroj ĉiusekunde, la frapa tuŝrapideco kvindekono de sekundo kaj la eksploda forto de la frapo superas 1500 kg. Julie de 1984 la Tjantan-a Encefalokirurgia Instituto de Pekino faris ekzamenon kaj trovis, ke la kranio de Hoŭ Ŭej estas trioble pli dika ol tiu de samaĝa knabo kaj tiu de Hoŭ Ŝujing kvinoble kiom tiu de ordinarulo.

Nun, kvankam oni ankoraŭ ne povas plene klarigi diversajn fenomenojn de la forta ĉigong-o, tamen sendube ĝi baziĝas sur materio. La moderna scienco certe povos malkovri la sekreton de la forta ĉigong-o en la proksima estonteco.

# Sur la tero de Guge-regno

Teksto kaj fotoj de LU GŬOJŬAN

Ĉe la suda bordo de Ŝjang-ĉjŭan-rivero en Zanda-gubernio, Ali-regiono okcidente de la Tibeta Altebenaĵo, kuŝas leŭsa monto ĉ. 300 metrojn alta. Nordoriente de la monto staras sep fortikaĵoj masonitaj el tero kaj tri pagodoj altaj je pli ol dek metroj. Sur la montdeklivo dense dislokiĝas pli ol 300 kavernoj, kiujn punktas kelkaj lamaejoj kun blankaj kaj ruĝaj muroj. La postrestantaj palacoj rampas sur la montdeklivo. La konstruaĵoj superstaras la nubojn kaj formas grandiozan konstruaĵaron. Rigardate de malproksime, la sennombraj altaj montpintoj staras unuj sur aliaj en la sudo, verdas arbedoj en la valoj ĉe la flankoj orienta kaj okcidenta, etendiĝas montĉenoj kiel ŝirmilo en la nordo,

inter la montĉenoj ŝtonaj pintoj kiel pagodoj rigardas foren al la antikva urbo. Tie estas ruino de Guge-regno, potenca loka reĝimo, kiu mirakle aperis en la tibeta historio.

En la komenco de la 7-a jarcento la ĉina historio eniris novan etapon. Tiam aperis unuigita regpotenco Tang-dinastio kaj tiel finiĝis la tumulta splita situacio longe daŭrinta en la ĉina nordo. Iom poste, daŭrigante la aferon de sia patro, Sunzamkam-po, la estro de Tibeto, fondis la reĝimon Tubo en la Tibeta Altebenaĵo kaj per tio efektivigis kaj plifirmigis la unuecon. Li energie predikis budhismon por firmigi sian regpotencon. Sekve, budhismo rapide disvastiĝis tra

Tibeto. Sed en la komenco de la 9-a jarcento fariĝis pli kaj pli forta la monaĥkliko, kio vekis malkontenton ĉe la kliko de malnovaj nobeloj de Tubo. Tiuj konkuris pri trono kun preteksto ekstermi budhismon. Poste en la longa tempo la batalo inter la kliko de la malnovaj nobeloj gajnintaj regpotencon kaj tiu de budhismaj fortoj, la akriĝo de konfliktoj interne de la reganta klaso, kontinuaj katastrofoj kaj epidemio, granda detruo de la sociaj produktaj fortoj, senĉesaj insurekcioj de plebanoj kaj sklavoĵoj, nobela separatismo kaj kontraŭstaro de la lokaj reĝimoj dronigis la tutan Tibeton en internan militon kaj splitiĝon, kio kaŭzis la finan disfalon de la reĝimo Tubo. Guge-regno ja estis

*La nova Amasa Arthalo de Ali-regiono*



loka separatisma reĝimo fondita tiutempe de Ĉideni Magun, nepo de la reĝo de Tubo Langdama, kiu iam grandskale subpremis la klikon de budhismaj fortoj.

Guge-regno okupis gravan lokon en la tibeta historio. Dum la pli-ol-400-jara separatismo kaj militado ĝi, kiel potenca loka reĝimo, rezistis kontraŭ la orientenekspeicio de fremdaj agrestantoj, kvazaŭ firma muro ĉe la sudokcidenta landlimo de Ĉinio.

Laŭ la libro "Notoj pri la Reĝoj kaj Korteganoj en Tibeto" sume 16 reĝoj heredis Guge-regnon, la antikvaj palacaj fortikaĵoj kun ĉiam pligrandiĝinta areo plurfoje rekonstruiĝis inter la 10-a jc. kaj 16-a jc. La nuna ruino de la palaco kovras areon de 180 000 kvadrataj metroj kun pli ol 300 domoj, 300 kavernoj kaj 5 okulfrapaj temploj kaj palacoj, t.e. la Ruĝa Templo,

Blanka Templo, Samsara Templo, Reĝa Palaco kaj Kunvenejo. Inter ili la Ruĝa Templo, Blanka Templo kaj Samsara Templo estas plej bone konservitaj. Sur la tegmentoj de la portaloj estas lignoskulptitaj leonoj, elefantoj, ĉevaloj, drakoj kaj pavoĵoj. En la temploj krom terakotaj budho-statuoj, estas ankaŭ multaj vivecaj freskoj, inkluzive portretojn de Ŝakjamunio, reĝoj de Tubo kaj la reĝidoj, kaj tiujn de la reĝo de Guge-regno kaj liaj subuloj. La muroj ĉirkaŭ la konstruaĵaro surhavas multe da ŝtonskulptitaj budho-statuoj. Ĉio ĉi montris, ke la antikva regno spertis prosperan vivon kaj havis brilan kulturon siatempe. En la pli ol dek kavernoj ĉirkaŭ la palacaj domoj kaj temploj konserviĝas multe da antikvaj armiloj, municioj, produktiloj, kuiriloj, tibetlingvaj libroj, arkebuzoj, pulvo, bambusagoj, glavoj, rapiroj, ŝil-

doj, kirasoĵoj, seloj, porcelanaj bovloj, kupraj bovloj, lignaj fiŝoj, plugiloj, ŝpatoj k.a. La kavernoj eble servis kiel tenejo de Guge-regno siatempe. Post centoj da jaroj la valoraj restaĵoj en la kavernoj bone konserviĝas pro sekeco kaj manko de oksigeno.

Guge-regno, iam prospera en la historio, disfalis ĉ. la 17-a jarcento. Post la demokratia reformo de Tibeto en 1959 la kruela servuta sistemo estis abolita kaj Ali, kie estis la antikva Guge-regno, reanimiĝis kaj eniris en novan etapon de disvolviĝo en la historio.

Se vi turnas vin de la rivero Ŝiĉjŭan al la valo de Gar-rivero, vi vidas, ke malproksime inter la verdaj arbedoj kaŝiĝas blankaj domoj, ĉirkaŭ kiuj sur la herbejoj punktiĝas tendoj kun longaj mallarĝaj flagoj. Tie estas Gar-

*La ruino de Guge-regno*





kunŝa, iama ĉefurbo de Ali-regiono, kie la Ali-a popolo komencis konstrui sian novan hejmlokon. En 1952 la Centra Popola Registaro establis gvidan instancan en Garkunŝa. Sub ĝia gvido la lokaj armeanoj kune kun la hanaj kaj tibetaj oficistoj kaj laboristoj, en vento kaj pluvo, konstruis oficejojn, halojn kaj dormejojn sur dezerto, kaj kultivis legomĝardenon en marĉejo. Ŝtataj komercaj instalaĵoj, popola banko, sanitarejo, poŝtofiĉejo k.a. tie starigis unu post alia.


Pli grandskala konstruado komenciĝis en 1965. En 1964 la Ŝingĵang-Ali-a Ŝoseo estis oficiale transdonita al trafiko. La konstruaj materialoj unuj post aliaj transportiĝis el la landinterno al Ali 4 300 metrojn alta super la marnivelo. Unu jaron poste, tie konstruiĝis la nova altebenaĵa urbeto Ŝiĉĵuanhe, kiu


fariĝis la nova politika, ekonomia kaj kultura centro de Ali-regiono. Tiu urbeto situas ĉe Ŝiĉĵuan-rivero ĉirkaŭita de la montaroj Karakoromo, Gangardesi kaj Himalajo. Antaŭ la paca liberigo de Tibeto oni devis uzi preskaŭ unu jaron por vojaĝi de Lhasa al Ali, Ŝingĵang aŭ Ĉinghaj pro longa distanco. Post la ekfunkciado de la Ŝingĵang-Tibeta Ŝoseo multe oftigis la rilatojn inter Ali-regiono kaj aliaj regionoj de Ĉinio, kio kreis favorajn kondiĉojn por disvolvi la regionon.

Antaŭe sur Ali-altebenaĵo kun areo de 350 000 kvadrataj kilometroj troviĝis neniu magazeno. Por aĉeti ĉiutagajn necesojn kamparanoj kaj paŝtistoj devis fari longan vojaĝon, kondukante ŝafaron kaj kunportante ŝaflanon aŭ salon, por interŝanĝi ilin. Nun en la urbeto la magazenoj ne nur vendas ĉiutagajn neces-

ojn produktitajn de Pekino, Ŝanhajo, Tjanĝin kaj aliaj gravaj urboj, sed ankaŭ la prezoj estas egalaj kiel tiuj en la landinterno, ĉar la transporta kosto de diversaj varoj estas pagata de la ŝtato. La sep gubernioj en Ali-regiono ĉiu havas sian magazenan, ĉiuj distriktoj kaj plejparto de la subdistriktoj havas sian provizvendan kooperativon aŭ vendejon kaj la "gruntbova magazeno" regule vendas varojn en tendoj.

En la feŭda servuta socio al Ali-altebenaĵo mankis produktiloj kaj en multaj lokoj oni bruligis fajron per siliko, kudris per osta pinglo kaj plugis per ŝafkorno. Post la paca liberigo tiu stato rapide ŝanĝiĝis. En 1970 en la oriento de la urbeto Ŝiĉĵuanhe aperis la Ali-a Agrikultura Fabriko, kio finis la historion, ke Ali-altebenaĵo ne havis industrion, kaj elkulturis la





*La tervarma elektrejo Langĝiŭ en konstruado*

unuajn teknikistojn por Ali. En la dua jaro post sia fondiĝo ĝi fabrikis 1 400 mezgrandajn kaj malgrandajn agrikulturilojn de 21 specoj, riparis ĉ. 250 aŭtojn. Hodiaŭ la industrio en Ali-regiono daŭre progresas. Elektrejo, agrikultura fabriko, aŭtoriparejo, leda, tapiŝa kaj aliaj malgrandaj fabrikoj, ĉiu havas certagradan skalon. En oktobro de 1985 sukcese ekfunkciis la unua generatora kompleto de la tervarma elektrejo Langĝiŭ 30 kilometrojn sudokcidente de la urbeto Ŝiĉjŭanhe, kaj finiĝis la historio, ke en Ali ne estis elektro.

En la dua jaro post ekpraktikado de la demokratia reformo la urbeto Ŝiĉjŭanhe starigis la Unuan Popolan Hospitalon kun 80 ĉambroj, 50 malsanulaj litoj kaj dekelkaj ambulatoriaj servoj. Samtempe kun tio, la ŝtato sendis tien grandan nombron da kuracistoj. Ili donas kuracadon al la tibetaj kamparanoj kaj paŝtistoj kaj kulturis tibetajn kuracistojn. Nun la gubernioj de Ali-regiono ĉiu havas sian pro-

pran hospitalon kun certagrada skalo. En Ali-regiono, ĉu en la urbetoj ĉu en la vilaĝoj kaj paŝtejoj, oni ĝuas senpagan kuracadon.


La malklereco kaj postiĝinteco, kiun kaŭzis la longdaŭra feŭda servutsistemo al Ali-altebenajo, malaperis por ĉiam. Antaŭ la liberigo, en Ali neniu el la dekmiloj da servutuloj vizitis lernejon. Tiam nur malmulte da lamaĵoj iom lernis en temploj. En 1953 Ali-regiono ekhavis sian unuan elementan lernejon, poste, pli ol 90% de la distriktoj starigis sian elementan lernejon, iuj lokoj ankaŭ funkciigis vesperan lernejon por likvidi analfabetecon de la plenaĝuloj. La elementaj lernejoj kaj vesperaj lernejoj por likvidi analfabetecon en paŝtaj regionoj plejparte estas migrantaj. Kie ili paŝtas, tie ili lernas. Nun radikale pliboniĝis la kultura vivo de la popolanoj. En la librejoj vendiĝas famaj hanlingvaj kaj tibetlingvaj libroj. Prezento de la regionaj artistaj trupoj kaj senpaga projekciado

de tibetlingvaj kaj hanlingvaj filmoj amuzas kaj ĝojigas la tieajn loĝantojn. En 1985 dekelkaj provincoj kaj municipoj de Ĉinio liveris senrekompencan monhelpon al Tibeto, kaj aperis sume 43 konstruaĵoj, inkluzive la pluruzan Amasan Arthalon de Ali-regiono.

Ekde 1984 en Tibeto ekpraktikiĝis la politiko stabila dum longa tempo, nome "agro apartenas al kamparanaj familioj" kaj "brutoj apartenas al paŝtistoj", kio revigliĝis ekonomion de la kamparoj kaj paŝtaj regionoj de Tibeto. Gvidate de tiu politiko, la kamparanoj kaj paŝtistoj en Ali-regiono strebas por levi la produktokvanton de greno kaj brutoproduktaĵoj kaj energie disvolvi var-produktadon kaj landliman komercadon. Ili lernas turni la superecon de diversaj riĉfontoj sur Ali-altebenajo, la "tegmento de la monda tegmento", en tiun de ekonomio. Tie sterniĝas vasta paŝtejo, vivas granda nombro da valoraj bestoj kaj raraj birdoj, kuŝas multaj subteraj riĉfontoj. . . Ĉiuj tiuj valoraj naturaj riĉfontoj nun estas en ekspluatado.

Ali estas ekspluatata kiel nova turisma loko. Por akcepti turistojn ĉinajn kaj eksterlandajn, Ali-restoracio kun kompare perfektaj ekipaĵoj jam estis ekkonstruita en 1985 en la urbeto Ŝiĉjŭanhe. La novaj ekonomiaj politikoj ekpraktikitaj en 1984 ricevis unuagradan benefikon. En 1985 la pokapa enspezo de la kamparanoj kaj paŝtistoj en la tuta regiono atingis 604 jŭanojn, je pli ol 300 jŭanoj pli multe ol tiu en 1984. Ali-anoj, kiuj sopiris "paradizon" generacio post generacio, nun konstatis, ke la feliĉa mondo estas pli proksima ol la "paradizo" malfacile atingebla.





*Ruino de la palaco de Guge-regno*

*Sanitarejo en montvilaĝo*







*Montpintoj sur Ali-altebenaĵo*



*Bird-insuleto sur  
Ali-altebenaĵo*



*Freskoj en la palaca ruino*





# VIRINOJ DE HUJ'AN


Fotoj de CAJ HAJFENG



*Knabino*



*Virinoj kun kapornamo*



*En kamparana familio*  
Foto de LJU FANG



La virinoj de Huj'an en originalaj vestoj estas laboremaj, modestaj kaj belaj. En foiro tie mi vidis, ke ĉiuj virinoj estas bele vestitaj. Ili portas bluzon, pantalonon kun grandaj krurumoj kaj bone videblan ĉarman zonan, kiu estas valora doto donita de iliaj gepatroj.

La fraŭlinoj portas flordeseĝnan kaptukon kaj belajn vestojn. Ili iras kiel flir-

tanta papilio. Multaj maljunulinoj portas ore flavan bambuan ĉapelon kaj nigrajn vestojn, kun hartubero ornamita per floroj aŭ io alia.

La viroj sin okupas pri fiŝkaptado aŭ laboras aliloke, tial la virinoj devas plenumi ĉiujn dom- kaj kamplaborojn i.a. domkonstruadon.

*Strato de Huj'an*




*Transportado de ŝtono*





*Babilo sur strato*



*Maljunulino vekto-  
portanta*





*Avino kaj nepo*



*Plugado*



## KURANTAJ AFEROJ

### 1 400 EKSTERLANDAJ AGENTEJ EN ĈINIO

Nun pli ol 1 400 entreprenoj de aliaj landoj, Hongkong kaj Aŭmen kaj elmigrantaj ĉinoj fondis sian agentejon en Ĉinio kaj faras diversajn ekonomiajn kaj teknikajn kunlaborojn.

De la pasintaj jaroj Ĉinio praktikas la politikon malferman al la eksterlando, pli kaj pli bonigas la investan medion en la specialaj ekonomiaj distriktoj kaj malfermitaj urboj kaj paŝo post paŝo kompletigas la eksterajn ekonomiajn kodojn. Rezulte, multaj eksterlandaj entreprenoj faris investon en Ĉinio kaj fondis sian agentejon en ĝi. En 1984 ĉ. 400 entreprenoj fondis sian agentejon en Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono. En 1985 pli ol 520 entreprenoj de 34 landoj kaj regionoj fondis sian konstantan agentejon en Ĉinio. Tiuj agentejoj

troviĝas en dudek-kelkaj urboj de Ĉinio.

### EKFUNKCIIS LA UNUA GRANDPNEŬMATIKA PRODUKTA LINIO DE ĈINIO

La nomita linio, enkondukita el Usono kaj povanta produkti 1 500 kompletojn da grandegaj pneŭmatikoj jare, estis finkonstruita kaj ekfunkciis la 15-an de majo en la Henan-a Pneŭmatikfabriko de la urbo Ĝjaŭzŭo, Henan-provinco. La linio produktas grandegajn pneŭmatikojn de 23 normoj. Tiel Ĉinio enviĉiĝas inter la malmultaj landoj, kiuj kapablas produkti grandegajn pneŭmatikojn.

### LA UNUA ĈINA FIZIKA LABORATORIO DE TANDEMO-ELEKTROSTATIKA AKCELATORO FINKONSTRUITA

La nomita laboratorio estis finkonstruita lastatempe en la Ĉina Akademio de Atoma Energio kaj baldaŭ ekfunkcios. Ĝi estas internacie avangarda fizika laboratorio. La finkonstruo de la labora-

torio de malalt-energia nukleofiziko montris, ke la studo de Ĉinio pri nuklea fiziko eniris novan stadion.

### LA ĈINA MAGNETOFONO KUN MARKO MOŜING PREMIITA PER ORA MEDALO

La magnetofono de tipo 9990 kun marko Moŝing, produktita de la Bajjunŝan-a Radioaparata Fabriko en Kantono, estis premiita per ora medalo en la Sesa Plovdiva Internacia Printempa Foiro okazinta en Bulgario la 9-an de majo. Estis la dua fojo, ke la ĉina elektronika produkto gajnis oran medalon internacie post la elektra ventumilo kun marko Vesperto, kaj la unua fojo, ke la ĉina magnetofono gajnis premion internacie.

### KRESKIS LA NOMBRO DE EKSTERLANDAJ TURISTOJ EN ĈINIO

En la unua trimestro la totala nombro de eksterlandaj turistoj en Ĉinio kreskis al 5 400 000, je 19% pli multe ol tiu en la sama periodo de la pasinta jaro, interalie en Pekino je 33.5%, en Ŝanhajo je 9.1%, en Kantono je 6.5%, en Gujlin je 2.8% kaj en Ŝĵian je 87.2%.

*La elektronika interŝanĝo aranĝita de la Komerca Ĉambro K.C.C. de Japanio en Pekino*



### ĈINIO LANĈOS DU USONAJN KOMUNIKAJN SATELITOJN

La 20-an de aprilo la Industria Kompanio "Granda Muro" de Ĉinio kaj la Teresat-a Korporacio de Usono subskribis en Nov-Jorko memorandon kontrakti pri lanĉo de satelitoj. Laŭ interkonsento, Ĉinio lanĉos la unuan usonan komunikan sateliton per sia raketo "Granda Muro n-ro 3" decembre de 1987 kaj la duan en 1988.

Estis la dua fojo por Ĉinio subskribi memorandon lanĉi alilandajn satelitojn, post kiam ĝi anoncis en la lasta novembro, ke ĝiaj transportaj raketoj povas fari internacian servon. En la unua duono de la kuranta jaro iu sveda spaco-kompanio petis Ĉinion lanĉi

ĝian poŝt-sateliton kaj por tio subskribis memorandon kun Ĉinio.

La transportaj raketoj "Granda Muro n-ro 3" jam lanĉis du ĉinajn komunikajn satelitojn en orbiton sinkronan al la tero.

### LA USONA AEROSPACA EKSPOZICIO EN PEKINO

La nomita ekspozicio okazis meze de majo en la Ĉina Internacia Ekspozicia Centro en Pekino. Ĝin partoprenis pli ol 70 manufakturoj el diversaj departementoj de la usona aerospaca industrio. En ĝi estis eksponataj motoroj, elektronikaj ekipaĵoj kaj aliaj avangardaj ekipaĵoj kaj pecoj.

### LA INFANA SCIENCA KAJ TEKNIKA DOMO DE SONG ĈINGLING FINKONSTRUITA

La 31-an de majo en Pekino okazis la inaŭguro de la Infana Scienca kaj Teknika Domo de Song Ĉingling, kiu sidas en la Infana Scienca Parko de Song Ĉingling sude de la pitoreska lago Baji, kun plankareo de 1 500 kvadrataj metroj kaj en formo de ventrado. En la domo estas salono de scienca

popularigo, salono de bildbend-projekcio kaj salono de ludo kaj ĉambro por komputado, ĉambro por lingvo-lernado kaj ĉambro de mikrolibroj. La domo estas la unua konstruaĵo farita de la Fonduso de Song Ĉingling per parto de la mono, sciencaj ekspoziciaj kaj ekipaĵoj donacitaj de en-kaj eksterlandaj amikoj kaj organizoj.



*Nupto de japanaj turistoj sur la Granda Muro*



*La inaŭguro de la Infana Scienca kaj Teknika Domo de Song Ĉingling*

# PRI KIO PENSAS LA GEKNABOJ?

— Enketo pri element-lernejoj de Pekino

Mi estas patrino de unu infano. Same kiel aliaj junaj patri-  
noj, mi ofte traktas mian infanon  
krude, al kio mi ŝajne jam alku-  
timiĝis.

Lastatempe mi faris skriban  
enketon al 80 element-lernejoj  
11-12-jaraj de la Ŭenŝing-a Ele-  
menta Lernejo de la Okcidenta  
Distrikto de Pekino. Mi atente  
legis iliajn leterojn. Iliaj infa-  
necaj respondoj kortuŝis min,  
patrinon. Iliaj sentoj estas  
subtila kaj plena de ĉagrenoj kaj  
kontraŭdiroj. Por ke niaj legan-  
toj konu la internan mondon,  
deziron kaj idealon de la ĉinaj  
geknaboj, ĉi-sube mi publikigos  
iliajn respondojn al 8 demandoj.

\* \* \*

1. Ĉu vi timas viajn gepa-  
trojn aŭ ne? Kial?


65% de la geknaboj respondis:  
“Mi ne timas miajn gepatrojn,  
ĉar ili tre amas min. Kiam mi  
ne scias kiel fari hejmtaskon,  
ili volonte helpas min.” “Se  
nur mi plenumas mian taskon en  
la lernado kaj ne petolas, ili la-  
sas min ludi.” “Ili ne flamiĝas  
nek riproĉas nek batas min, sed  
donas rezonon al mi pacience,  
kiam mi faras eraron.”

18% de la geknaboj respondis:  
“Mi timas.” “Ili batas min,  
kiam mi ofendas ilin aŭ petolas.”  
“Precipe kiam miaj lernonotoj  
malboniĝas, ili ĵetas al mi ripro-  
ĉan rigardon kaj eĉ laŭte kritikas  
min, kio ofte metas min en em-

barason.” “Mia patro malofte  
ridetas antaŭ mi. Li ĉiam kun  
serioza mieno postulas, ke mi  
senĉese lernu. Eble li pensas, ke  
la intimeco kun mi detruos lian  
aŭtoritatecon.”

10% de la geknaboj respondis:  
“Mi kaj timas kaj ne timas.”  
“Miaj gepatroj ofte kontrolas  
mian hejmtaskon. Kiam ili tro-  
vas, ke mi faris hejmtaskon  
klare kaj ĝuste, ili laŭdas min;  
sed kiam ili trovas en mia hejm-  
tasko erarojn aŭ mi ricevas kom-  
pare malbonajn notojn, ili ripro-  
ĉas min kolere.” “Mi ne timas,  
nur se mi ne faras erarojn. Mi  
timas ilian baton, kiam mi faris  
malbonaĵon.” “Kiam estiĝas  
konfliktoj inter mi kaj miaj kun-

Lernantino Ŝju Ŭej voĉlegas tekston.



Lernantino Lu Jan'an kaj ŝia patrino





lernantoj, miaj gepatroj ĉiam kritikis min. Se mi eraras, mi timetas. Se mi ne estas kulpa, mi ne nur ne timas, sed anstataŭe insistas en miaj opinioj.”

5.9% de la geknaboj diris: “Kiam miaj gepatroj kverelas inter si, ili ofte verŝas sian koleron sur min, kvazaŭ mi estus ilia propeka kapro.” “Iafoje mi petas ilian helpon en mia plenumo de la hejmtasko, ili ĉiam rifuzas tion, postulante, ke mi faru tion mem, aŭ dirante, ke al ili mankas tempo.” “Fininte la hejmtaskon, mi deziras rigardi televidon, sed ili malpermesas al mi.”

II. Kiajn homojn vi ŝatas? Pri kio vi volas okupiĝi, plenkreskinte?

32.5% de la geknaboj respondis: “Mi ŝatas bravajn heroojn.” “Mi ŝatas homojn diligentajn en lernado kaj lertajn en cerbumado.” “Mi ŝatas homojn helpemajn, honestajn kaj ne babilemajn.” “Mi ŝatas homojn fervorajn al laboro.” “Mi ŝatas memregemajn homojn.”

20.7% de la geknaboj diris: “Mi ŝatas la homojn, kia T.A. Edison, kiu portis lumon al la socio.” “Mi ŝatas la homojn erudiciajn kaj kompetentajn en grandaj aferoj.”

10.8% de la geknaboj ŝatas siajn instruistojn, ĉar sen ili ne estas talentuloj, kvankam ili estas senfamaj.

10% de la geknaboj diris: “Mi ŝatas tiajn honestajn, diligentajn kaj saĝajn homojn, kiaj miaj gepatroj. Kvankam malriĉaj, ili estas bonkoraj.” “Mi ŝatas novtipajn kamparanojn klerajn, sed ne tiujn, kiuj havas pli ol dek mil jŭanojn, ĉar riĉeco povus malbonkondukti homojn.”

8.9% de la geknaboj diris: “Mi ŝatas tiujn, kiuj akiris ri-



Leciono

markindajn sukcesojn sur ordinaraj postenoj.” “Mi ŝatas la personojn aperintajn en ĵurnaloj kaj televido, ĉar ili estas kapablaj.”

La enketo montris, ke 8.2% de la geknaboj ŝatas literaturistojn, poetojn, ĉar ili estas kompetentaj al sia ofico, saĝigaj kaj kuraĝigaj.

7.5% de la geknaboj diris: “Mi ŝatas la sportistojn plenforte strebantajn, kia Lang Ping, kiu glorigas siajn patrujon kaj parencojn.”

Pri la demando “Pri kio vi volas okupiĝi, plenkreskinte?” la geknaboj eldiris proksimume 20 belajn dezirojn kaj idealojn. Ili volas esti sciencistoj, inventistoj, poetoj, verkistoj, inĝenieroj, teknikistoj, instruistoj, kuracistoj, sportistoj k.a.

III. Kion vi plej abomenas?

45% de la geknaboj respondis: “Mi plej abomenas homojn petolemajn, kverelemajn kaj batalemajn.” “Mi malŝatas tiujn, kiuj ĝenas aliajn en lernado.”

19% de la geknaboj respondis: “Mi malamas tiujn, kiuj ne helpas aliajn.” “Mi malamas tiujn, kiuj kontribuas per nenio al la patrujo kaj popolo.”

18.3% de la geknaboj respondis: “Mi malamas mensogulojn, fanfaronulojn kaj malbonfarulojn.” “Mi malamas klaĉulojn, ĉar tiaj homoj estas malbonkoraj kaj ne povas esti bonaj amikoj.”

15.2% de la geknaboj abomenas tiujn, kiuj malestimas kaj mokas aliajn, kaj tiujn, kiuj ne ŝatas labori, ĉasas sole monon, ignorante sian renomon kaj interesiĝas pri diboĉado.

IV. Kiu plej prizorgas vin, kiam vi estas malsana?


68% de la geknaboj respondis: “Tiam min plej prizorgas miaj gepatroj.”

25% de ili respondis, ke instruistoj kaj kunlernantoj zorgas pri ili pli ol iliaj gepatroj, ĉar la lastaj estas tro okupitaj kaj ne havas tempon por tio.

6.2% de la geknaboj respondis:



*Kia ĝojo!*



*Helpo*

“Min plej prizorgas miaj avino kaj geonkloj.”

V. Ĉu vi havas poŝmonon? Se vi havas, kiel vi ĝin disponas?

95% de la geknaboj respondis, ke ili havas. Per la mono ili aĉetas postlecionajn legaĵojn, referencajn librojn, skribilojn k.a. Malmultaj el ili per la mono aĉetas novelojn, konfitaĵojn kaj rigardas filmon, ĉar filmoj povas larĝigi la vidkampon.

Nur 5% de la geknaboj respondis, ke ili ne havas poŝmonon, ĉar ili havas plurajn gefratojn kaj la familio ne havas sufiĉe da mono aŭ iliaj gepatroj ne zorgas pri tio, kaj ke ili petas de siaj gepatroj fari la aĉeton, se bezone.

VI. Kio estas via plej alta deziro?

55% de la geknaboj respondis, ke tio estas sukcesi en ekzameno por eniri bonan mezlernejon.

18% de ili deziras kiel eble plej rapide kreski, komenci laboron kaj dividi la familian ŝarĝon por la gepatroj.

10% de ili deziras posedi pli da scioj por fariĝi altranguloj, glorigi la gepatrojn kaj montri sin nesentaŭgaj. Iuj volas esti elstaraj lernantoj ĉiujare.

9.5% de ili diris, ke ili bezonas esti fidataj kaj komprenataj kaj posedi ĉion, kion scias iliaj instruistoj.

VII. Kion vi faras post la lecionhoroj? Kian ŝatokupon vi havas?

54% de la geknaboj en la postlecionaj horoj legas librojn, gazetojn kaj bildakontojn, ĉar libroj povas saĝigi la homojn.

30% de la geknaboj faras sportadon eksterdome, ludas pilkon, ŝnursaltas, kantas, dancas k.a. kio povas vigligi la penson. La longtempa sidado en la klasĉambro estas kapturna, dum la eksterdoma ekzercado estas refreŝiga.

8% de la geknaboj respondis: “Mi ŝatas diskuti kun aliaj pri problemoj,” “reciprokan demandadon kaj interhelpon” kaj “respondadon al testoj en ĵurnaloj”.

6.5% de la geknaboj respondis, ke ili aŭskultas radio-elsendon pri noveloj en serio, skribas artikolon por murgazeto kaj faras malgrandan inventon.

Koncerne la demandon “Kian ŝatokupon vi havas?” 96% de la geknaboj respondis, ke ili havas 25 hobiajn. Ili opinias, ke kun hobiaj oni havas interesan vivon.

4% de la geknaboj diris, ke ili ne havas hobiajn pro manko de tempo kaj multe da hejmtaskoj aŭ ili ne interesigas pri ludado pro la peza tasko en lernado.

VIII. Ĉu vi emas vin beligi? Por kio?

52% de la geknaboj ŝatas sin beligi por aspekti puraj kaj okulplaĉaj. “Belaj vestoj faras komforton kaj agrablon.”

48% de la geknaboj respondis, ke ili ne ŝatas sin beligi, sed direktas sian atenton al lernado. Iuj respondis: “Beligo ja estas bona, sed mi ne laboras kaj ne havas monon por min beligi.” “Mi lernas ne bone kaj estas ne bela, tial mi timas, ke mia beligo estigos mokridon ĉe aliaj.”



## KURANTAJ AFEROJ

### INFANA KONKURSO PRI LUDO DE ELEKTRONIKA INSTRUMENTO

Sub la aŭspicioj de la Fonduso de Song Ĉingling de la 26-a ĝis la 28-a de majo okazis en Pekino konkurso de ĉinaj infanoj pri ludo de elektronikaj instrumentoj por la Internacia Jaro de Paco. Tio estis unu el la aktivadoj de la Internacia Jaro de Paco en Ĉinio, por esprimi la deziron de la ĉinaj infanoj ami pacon kaj defendi la mondpacon. La konkurso iris en du grupoj: unu el la 4-6-jaraj kaj la alia el la 7-12-jaraj. Ĝin partoprenis pli ol 100 infanoj el 28 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando. En la Infana Tago de 1985 la Fonduso de Song Ĉingling donacis elektronikajn instrumentojn al la infanoj de 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, kio antaŭenpuŝis instruadon de muziko al infanoj.

### 100-METRE LONGA PENTRAJO DONACOTA AL UN

La 100-metre longa pentraĵo "Ni Amas Pacon" priskribanta, ke la ĉinaj geknaboj amas la naturon, vivon kaj pacon, estis farita de 100 geknaboj la 29-an de majo en la Centro de Ĉinaj Geknaboj en Pekino. La pentraĵo estos donacita oktobre al la Organiza Komitato de la Internacia Jaro de Paco sub UN.

### NOVA SUROGATO DE SANGO APLIKATA

La nova surogato, sinteza perfluoro-karbona sango, farita de la Ŝanhaja Instituto de Organika Kemio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj aliaj organizoj, antaŭ

nelonge estis aplikata al kuracado unuafoje en la mondo. La surgato estas nova materialo de sinteza perfluora biofunkcio. Antaŭtano sango ĝi transfuzas oksigenon en ĉiujn organojn de la homa korpo. Ĝi povas esti vaste uzata sen distingi sangogrupon kaj korpostaton kaj sen limigi aplikan kvanton.

### 43 GRANDAJ PANDOJ ŜAVITAJ EN ĈINIO

En la pasintaj pli ol tri jaroj Ĉinio akiris rimarkindan sukceson en savado de grandaj pandoj. Ĝis la fino de marto ĉijare oni savis 61 grandajn pandojn malsatajn kaj malsanajn, el kiuj 43 postvivis. La laboro paŝo post paŝo transiras de apliko de urĝaj rimedoj al ellaboro kaj praktikado de efikaj rimedoj por savi la bestojn.

### ĈINAJ HALTERLEVISTOJ EN LA 12-A MONDA JUNULA HALTERLEVA ĈAMPIONECA KONKURSO

La Ĉina Junula Halterleva Teamo, kiu partoprenis en la nomita konkurso en Donaueschingen, FR Germanio, gajnis ok el la naŭ oraj medaloj de la unuaj tri kategorioj, kvar arĝentajn kaj tri kuprajn medalojn.

La 19-jara ĉina sportisto He Ĝuoĉjang ŝirlevis 116 kg. en la konkurso de la 52-kilogramo kategorio kaj per tio rompis la mondan rekordon de 115.5 kg., kiun kreis bulgara sportisto antaŭ tri jaroj.

### LJU ŬEJ GAJNIS LA ĈAMPIONECON DE VIRINA TUROPLONĜO

La ĉina plonĝistino Lju Ŭej per 437.61 poentoj gajnis la ĉampionecon de la virina turoplonĝo en la Meksika Internacia Plonĝa Konkurso okazinta meze de majo.

La kanada plonĝistino D. Fuller per 436.95 poentoj gajnis la subĉampionecon. La trian lokon gajnis la ĉina plonĝistino Ĉen Lin per 434.97 poentoj.

La konkurson partoprenis 35 sportistoj el Ĉinio, Kanado, FR Germanio, Usono, Hispanio, Aŭstralio, la Dominika Respubliko, Svislando, Meksiko kaj Argentino.

*Ĉinaj geknaboj faras 100-metre longan pentraĵon por UN.*







*Hindaj dancistinoj lernigas hindan dancon al ĉinaj kolegiinoj.*

## Ponto de arta interŝanĝo kaj kunlaboro

de LONG MING

Loĝantoj en Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj grandaj urboj de Ĉinio ne nur povas apreci en postlaboraj horoj la ĉinajn tradiciajn muzikon, kanton dancon kaj operon kaj simfonion, baleton prezentitajn de ĉinaj artistoj, sed ankaŭ havas ŝancon apreci brilan prezentadon de alilandaj artistoj. Precipe en la lastaj 8-9 jaroj al ili ne mankis tiaj ŝancoj.

### PREZENTADO DE ALTNIVELAJ ARTAJ TRUPOJ

Depost 1978, preskaŭ ĉiujare multaj artaj trupoj venis por fari turneon en Ĉinio. Nemalmultaj mondfamaj artistoj kaj artaj trupoj prezentis sur ĉinaj scenejoj.

Oktobre de 1979 la mondfama muzikmajstro Herbert Karajan kaj la Berlina Simfonia Orkestro vizitis Pekinon, kio ebligis al ĉinaj aŭskultantoj rigardi la majstron kaj aŭskulti muzikaĵojn direktatajn de li persone. Post du monatoj alia mondfama direktisto Seiĝi Ozaŭa vizitis Ĉinion. La Bostona Simfonia Orkestro de Usono sub lia direktado refoje ĝuigis la ĉinajn aŭskultantojn per sia prezentado. Maje de 1983 la Reĝa Baleta Trupo de Britio, modelo de la klasika baletto, turneis en Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono kaj prezentis klasikajn verkojn.

Krome, iuj altnivelaj artaj trupoj, kiaj la Reĝa Baleta Trupo de Danlando, la Bavaria Opertrupo de FR Germanio, la Old-Wick Drama Trupo de Britio, la Tragedia Trupo de Grekio,

U. Shankar-Danctrupo de Hindio, la Moskva Klasik-baleta Trupo de Sovetio, aŭstraliaj kaj usonaj trupoj de moderna danco prezentis sian brilan arton en Pekino. Ilia prezentado donis al la ĉinaj spektantoj raran ŝancon apreci kaj koni arton de aliaj landoj kaj ricevis varman aplaŭdon.

### ANKAŬ ILI ESTAS DANKINDAJ!

Al ĉiu prezentado la spektantoj esprimis sian saluton kaj sinceran dankon per longdaŭra aplaŭdado. Sed tiam ili eble ne pensis, ke ili devas esprimi sian dankon al tiuj homoj, laborantoj de la Ĉina Impresaria Kompanio. Estis ili, kiuj surscenigis tiel eminentajn artojn. Fakte, sen ilia diligenta laboro, estus nur revo la deziro apreci simfonion direktatan de Ĉarajan aŭ rigardi la gracian baletan de la Reĝa Baleta Trupo de Britio.

La Ĉina Impresaria Kompanio situas ĉe ordinara strato de Dongĉeng-distrikto de Pekino. Sub la gvido de la Kultura Ministerio de Ĉinio, ĝi okupiĝas pri interŝanĝo de ĉinaj kaj fremdlandaj artoj. Nun ĝi havas pli ol 80 funkciulojn.

Ĝiaj ĉefaj laboroj estas plenumi la artan interŝanĝon de la kulturaj interkonsentoj kontraktitaj de la ĉina kaj alilandaj registaroj kaj fari konkretajn aranĝojn pri la turneoj de ĉinaj artaj trupoj en aliaj landoj kaj tiuj de la alilandaj en Ĉinio. En 1985 oni aldonis al ĝia laboro novan



*Estro de la Ĉina Impresaria Kompanio akceptas hungarajn artistojn.*

enhavon: entrepreni komercajn prezentojn de ĉinaj artaj trupoj en aliaj landoj.

En la pasintaj pli ol 30 jaroj ĝi akceptis artistojn kaj artajn trupojn el 78 landoj. Dank' al ĝia laboro, 470 artaj trupoj de aliaj landoj surscenigis en Ĉinio muzikaĵojn, dancojn, dramojn, akrobataĵojn kaj aliajn.

Krom la supre menciitaj artistoj kaj artaj trupoj, ĝi rekomendis al ĉinaj spektantoj ankaŭ multajn artojn pri kanto, danco kaj muziko kun forta nacia karaktero kaj loka etoso. Interalie, troviĝis japana kabuko, maoria kantodanco de Nov-Zelando, popolaj dancoj de Pollando, Hungario, Jugoslavio, Egiptio, Hispanio, afrikaj kanto-



*Rumanaj artistinoj akceptas membrojn de la Pekin-opera Teatro de Interna Mongolio de Ĉinio.*



*S-ro Horst Börner, direktoro de la Impresaria Kompanio de FR Germanio, intervidiĝas kun estro de la Ĉina Impresaria Kompanio (la dua de dekstre). La unua de dekstre estas la aŭtoro.*

dancoj de Etiopio, Kongolando, Tunizio, Somalio, Meksikia moderna baletto, usona magio kaj similaj kun originalaj kulturaj tradicioj kaj stiloj.

Depost 1978 laŭ ĝia aranĝo ĉiujare 40-50 ĉinaj artaj trupoj turneis en aliaj landoj. Ĝis nun, sume pli ol 420 artaj grupoj kaj trupoj kun ĉ. 20 000 homfojoj vizitis 138 landojn kaj regionojn. Ili prezentis en tiuj landoj teatraĵojn, dancojn, muzikaĵojn, akrobataĵojn kun ĉina kultura tradicio. La ĉinaj simfonio, baletto kaj moderna dramo estis enkondukitaj el la Okcidento, sed ili jam havas sufiĉe grandan disvolviĝon dank' al penado de la ĉinaj artistoj. En la lastaj jaroj la Centra Orkestro, la Centra Baleta Trupo kaj la Pekina Popola Arta Teatro (moderna teatro) de Ĉinio turneis eksterlande, tio montris al okcidentaj spektantoj la disvolviĝon de tiuj artoj en Ĉinio.

## **PONTO DE INTERŜANĜO KAJ KUNLABORO**

En la "enkonduka" kaj "eksporta" laboro la kompanio prenas akceladon de la interŝanĝo kaj kontaktiĝo inter artistoj kaj inter artistoj kaj popoloj kiel sian gravan celon.

Kiam alilandaj artaj trupoj turneis en Ĉinio, la kompanio ofte aranĝis ilian intervidiĝon kun la ĉinaj kolegoj antaŭ aŭ post ilia prezentado, por ke ili interŝanĝu spertojn kaj artojn. Karajan, Seiĝi Ozaŭa, Menuhin kaj aliaj artaj majstroj ĉiuj havis amikan kontakton kun la direktistoj kaj

muzikistoj de la Centra Filharmonio de Ĉinio. Ankaŭ membroj de la Reĝa Baleta Trupo de Britio serioze diskutis pri dancarto kun siaj ĉinaj kolegoj.

Dank' al la aktivado de la kompanio, la ĉinaj kaj alilandaj artistoj ofte faris prezentadon sur sama scenejo. Seiĝi Ozaŭa jam direktis la Centran Orkestro, Menuhin kunlaboris kun ĉinaj knabaj violonistoj. Kiam la Moskva Klasik-baleta Trupo turneis en Ĉinio, ĉiu ĝia prezentado estis farita kunlabore kun ĉinaj baletistoj. En 1984 geaktoroj de la Anhuj-a Akrobata Trupo kaj la Nankina Akrobata Trupo de Ĉinio turneis ok monatojn en Svislando kunlabore kun la Svisa Cirka Trupo. Komence de 1986, 20 geaktoroj de la Ŝanhaja Akrobata Trupo veturis al Usono kaj laŭplane ili prezentos unu jaron kunlabore kun cirka trupo de Usono.

## **POR DISVOLVIĜO DE LA ĈINAJ ARTOJ**

La kompanio donis rektan helpon al ĉinaj artoj en ilia disvolviĝo. La tradiciaj prezentaj artoj de Ĉinio delonge entenas en si prezentan faktoron de pantomimo, sed pro diversaj kaŭzoj pantomimo ne fariĝis sendependa arto en Ĉinio. De 1982 la kompanio invitis francan pantomimiston Marcel Marceau kaj pantomimajn trupojn de Aŭstralio, Ĉeĥoslovakio kaj Britio al Ĉinio. La eminenta prezentado de la pantomimistoj multe inspiris ĉinajn artistojn. Nun Ĉinio jam havas tri pantomimajn trupojn.

La kompanio plej multe helpis la Ĉinan Orientan Ensemblon, fonditan en 1962. La ensemblo prezentas ĉefe naciajn kantodancojn de Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, kiam alilandaj naciaj ensembloj turneis en Pekino, la kompanio ĉiam favoris ĝin per ŝanco lerni. Se ĝiaj geaktoroj ne ellernis eksterlandan programeron en Pekino, la kompanio do donis al ili ŝancon daŭre ĝin lerni en alia urbo, kie turneis la ensemblo. Nun la Ĉina Orienta Ensemblo jam scipovas prezenti pli ol 200 kantodancajn programerojn de pli ol 40 landoj kaj ludi alilandajn popolajn muzikilojn.

### **Pardonpeto**

Pro malatento ni neglektis la nomon de s-ino Lŭo Jefen, la aŭtoro de la artikolo "La Kulturo de la Antikva Djan-regno", p. 36, 7-a numero, 1986. Ni petas ŝian pardonon.



## SOLVO MANGĀS SOLVON

En la antikva Ĉinio estis granda saĝulo Caŭ Ĝu. Foje venis al li iu homo, kiu pretendis esti saĝa kaj intencis rivali kun Caŭ Ĝu. Li faris al Caŭ la enigmon: "Kiu besto kuŝas, staras kaj iras ĉiam en sida pozo?"

Aŭdinte tion, Caŭ Ĝu ankaŭ faris al li enigmon: "Kiu besto sidas, staras kaj iras ĉiam en kuŝa pozo?" La gasto rompis al si la kapon kaj ne povis diveni.

Caŭ Ĝu diris: "Mia solvo povas manĝi la vian." Liaj vortoj estis admirataj de la gasto.

Divenu, niaj saĝaj legantoj, kiuj bestoj ili estas?

(Solvo trovebla en ĉi numero)

## ĈU VI SCIAS?

1. Kio estas uzebla nur post sia rompiĝo?
2. Kio estas frakasebla sen atako?
3. Io apartenas al vi, tamen oni uzas ĝin multe pli ofte ol vi. Kio ĝi estas?
4. Kio povas iri tage kaj nokte sen piedoj?
5. Kio povas atingi kun unu piedo ĉiun angulon de domo?
6. Kio restas ankoraŭ ĉe angulo post vojaĝo tra la mondo?

(Solvoj troveblaj en ĉi numero)

## INTERESA LUDO

Preparo: Streku sur la tero cirklon kun du-metra diametro. Ludu du personoj ĉiu kun unu aŭ du ciferoj skribitaj sur kartono

sur la dorso. Krucinte siajn manojn postdorse, la ludantoj staru vid-al-vide en la cirklo.

Metodo: Dum la ludo ĉiu el la ludantoj en la cirklo devas klopodi ĉiamaniere por vidi la cifero(j)n sur la dorso de la kontraŭulo kaj laŭeble ne vidigi la sia(j)n. Kiu la unua vidas la cifero(j)n sur la dorso de la kontraŭulo, gajnas la ludon.

Rimarkoj: (1) La ludantoj devas streĉi siajn manojn ĉe la dorso. (2) Neniu el la ludantoj rajtas korpe puŝi la kontraŭulon. (3) Eraras tiu, kiu piedpremas aŭ transpasas la cirklon. Kiu trifoje faras tion, perdas la ludon.



## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* Mi estas 45-jaraĝa oficistino, deziras korespondi kun juna ĉina knabino (mia estonta nevino), kun samaĝa ĉina kaj kalifornia samideaninoj. Mi interesiĝas pri libroj, lingvoj, muziko kaj kutimoj. Adr.: Blanka Pavloviĉ, Niederamtstrasse 60, CH-4632 Trimbach, Svisio.

\* LETERVESPERO, aranĝota novembro, de Depto. Esperanto. Sarmento Leite 997 Porto Alegre RS 90050 Brazilo. Skribu amase.

\* Zhang Xiukuan, Shoubiaoyuanjian Yi Chang, Dandong, Liaoning, Ĉinio, volas korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj.

\* S-ro Zhang Jihai (32-j. interpretisto) dez. kor. kun geamikoj anglaj, usonaj kaj kanadaj pri lit. kaj aliaj temoj. Adr.: Zhengce Yanjiu Shi, 2 Dong Er Xiang, Beihai, Guangxi, Ĉinio.

\* Volas kolekti librojn pri instruado de E-o, precipe pri Ĉe-metodo. Reciprokas per ĉinaj metiartaĵoj aŭ ĉinaj E-libroj. Adr.: Deng Yuanping, Fengle Youku, Zhongxiang, Hubei, Ĉinio.

\* Ren Hua (23-j. studento) dez. kor. kun geamikoj ĉefe japanaj,

usonaj, afrikaj, pri diversaj temoj. Adr.: 151 Long 3 Hao 401 Shi, Nan Shan Lu, Shanghai, Ĉinio.

\* Gong Xuesheng (33-jara instruisto) dez. ŝanĝi fotojn, poŝtmarkojn kaj E-gazetojn. Adr.: Liuji Zhong Xue, Nanzhang Xian, Hubei, Ĉinio.

\* Policisto 23-jara dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj. Li Liang, P.O. Box 111.3, Shenyang, Liaoning, Ĉinio.

\* Serĉas dekopan (proksimume) grupkorespondadon kun Ĉinio, pri ĉiuj temoj, historio, folkloro, kutimoj, vivorganizo, ktp. Centre Culturel Saintais Par L'Esperanto, Manceau Jacques, 4 rue des Chênes, Fontcouverte F-17100 Saintes, Francio.

\* Enkadre de la 100-jara jubileo de Esperanto ni turnas nin al la

# ĈINAJ VEGETARAJ PLADOJ

*Laŭ peto de nia rumana leganto samideanino V. I. Popescu ni verkis jenan artikolon.*

— La Red.

Ne longe post kiam mi sidiĝis ĉe manĝotablo, bela servistino alportis al mi bieron kaj la pladojn: Dolĉ-acida ŝtonkapa fiŝo, ansero kun pinaj nuksoj kaj frititaj angilstrioj.

Tiuj pladoj, preparitaj de kuiristoj de la Pekina Vegetara Restoracio, forme similas al ansero, angilo kaj ŝtonkapa fiŝo, sed fakte tute el vegetaraj materialoj.

La Pekina Vegetara Restoracio situas en Ŝjŭannej-strato ne malproksime de la Malpermesita Urbo. Vicdirektoro de la restoracio Ŝi Ŝuŝeng diris al mi, ke la restoracio datiĝas jam de 1900. Tiam en la urbo Jangĝoŭ ĉe la malsupra baseno de Jangzi-rivero estis majstro pri preparado de vegetaraj pladoj Ŝjong Ĝŭang-ŝing. Li funkciigis vegetaran Ses-

gustan Restoracion ankaŭ en Pekino. Kiam li maljuniĝis, lia elstara disĉiplo Ĝoŭ Juting entreprenis islaman restoracion, kiu estis alinomita la Pekina Vegetara Restoracio en la 60-aj jaroj. Poste Liŭ Jongŝi, amata disĉiplo de Ĝoŭ Juting, fariĝis ĝia direktoro. Bedaŭrinde, kiam mi vizitis la restoracion, li estis eksterlande.

Vicdirektoro Ŝi diris al mi, ke la pekinaj vegetaraj pladoj estas nemankigebla parto de la pekingustaj pladoj. Kuiristoj preparas el fungoj, fabaj produktoj, fruktoj kaj legomoj diversajn vegetarajn pladojn aromajn kaj bongustajn kun plaĉa koloro kaj bela aspekto en formoj de koko, anaso, fiŝo, salikoko k.a. La restoracio preskaŭ ĉiutage pleniĝas de klientoj.

Laŭ historiaj notoj ĉinaj vegetaraj pladoj havas longan historion. En la primitiva socio la homoj vivis de kolektiva frukto-

kolektado. Ili devigite manĝis tion, kion ili kolektis aŭ ĉasis pro malaltaj produktaj fortoj. En Ŝang-dinastio (ĉ. 16 jc. — 11 jc. a.K.) nutrofontoj pli riĉiĝis ol antaŭe, oni havis la eblon elekti nutraĵon por si. Kaj la pladoj iom post iom dividiĝis en vian-dajn kaj vegetarajn. Kun apero de toŭfuo en Ĉinio kaj enkonduko de multspecaj legomoj kaj fruktoj en Ĉinion de eksterlande formiĝis la materia bazo por vegetaraj pladoj. Estas aparte menciinde, ke Ŝjaŭ Jan, imperiestro Udi (502-548 p.K. sur trono) de Ljang-dinastio, kredis je budhismo, ĉiamaniere pledis por vegetaraj pladoj kaj ludis aktivan rolon de la evoluo de la ĉinaj vegetaraj pladoj. Kaj pro tio posteuloj misopinias, ke la ĉinaj vegetaraj pladoj originas el budhismo. Tio ne konformas al historia fakto.

En Ĉing-dinastio (1644-1911 p.K.) aperis ora periodo en la ĉina vegetara historio. Tiam en

tutmonda esperantistaro cele al ekspozicio, kiun ni prezentos en Parizo dum la printempo de 1987.

Ni bezonas fotokopiojn de librotitoloj (malnovaj libroj pri esperantista laborista movado notinde), afiŝojn (novajn kaj malnovajn), poŝtkartojn (pejzaĝojn, bildojn pri Esperanto kaj porpacaj temoj), turismajn prospektojn en Esperanto, insignojn,

ktp. Tiuj dokumentoj estu ĉu donacitaj, ĉu pruntesenditaj. Kondiĉojn bonvolu precizigi. Adr.: Federation Esperantiste du Travail, 179, rue Ordener, 75018 Paris, Francio.

\* Radio Mateno, nova junulara societo en Islando prezentas diversan aŭdprogramon — kanto, laŭtleĝo kaj ludo en Esperanto. Por tion ricevi, sendu 2 int. resp. kup. kaj almenaŭ 25

minutan kasedon al: St. Sig., Kaplaskjolsvegi 53, Is-107, Reykjavik, Islando.

\* Oni intencas starigi novan fakan asocion por fakuloj kaj interesuloj en la tiel nomata alternativa, naturmetoda kuracado. Por plia informo, skribu al la provizora adreso: Faka Asocio de Naturmetoda Kuracado, 89, Triq is-Santwarju, Zabbar, Malta.



Preparado de la vegetara plado "ŝtonkapa fiŝo kun sukero kaj vinagro"

la imperiestra kuirejo estis starigita speciala oficejo pri vegetaraj pladoj por la imperiestro. Kaj aperis multaj famaj temploj, kiaj Fajŭan-templo de Pekino, Ĉingjŭn-templo de Kantono, Ĝinŝan-templo de Ĝenĝjang, Jufo-templo de Ŝanhajo kaj Lingjin-templo de Hangĝoŭ, lertaj en preparado de vegetaraj pladoj. Samtempe kun tio, rapide kreskis la nombro de vegetaraj restoracioj en nutraj-merkatoj de diversaj lokoj, kio pliigis specojn de la vegetaraj manĝaĵoj. La libro "Skizo de Vegetaraj Manĝaĵoj" eldonita en la fino de Ĉing-dinastio konigas pli ol 200 specojn de

vegetaraj manĝaĵoj en Pekino kaj Senŝji-provinco.

En la ĉinaj gastronomiaj sistemoj la vegetaraj pladoj estas distingiĝaj kaj plaĉaj al la homoj ĉefe pro jenaj karakterizaĵoj:

Unue, ili estas preparitaj el materialoj freŝaj kaj bongustaj. La ĉefajn materialojn por vegetaraj pladoj konsistigas giromitroj, pajlaj agarikoj, orefungoj, blankaj orefungoj, lotussemoj, gluteno, taglilio, floroj, legomoj, toŭfuo kaj sojfabaj produktoj. La pladoj karakteriziĝas per delikateco, mildeco kaj apartaj gustoj.

Due, ili estas multspecaj kaj delikate preparitaj. Oni povas prepari diversajn pladojn el ordinara vegetaraj materialoj. Ĉu simplaj ĉu festenaj pladoj, ĉiuj povas esti faritaj el vegetaraj materialoj en formo de viandaj pladoj. Tiutage en la restoracio mi vidis, ke ok klientoj elspezis ĉ. 400 jŭanojn (egale al pli ol cent usonaj dolaroj) por unu tablo da vegetaraj pladoj. Sur la tablo estis dolĉ-acida ŝtonkapa fiŝo, krizantemo kaj holoturio, frititaj salikokoj, frititaj ŝarkonaĝiloj, kolombovoj kaj tradiciaj pladoj arhat-plado kaj frititaj bambuido, kiuj ĉiuj estis delikate faritaj same kiel viandaj pladoj.

Trie, ili estas nutroriĉaj kaj tonikaj. Por prepari vegetarajn pladojn oni uzas sojfabajn produktojn, legomojn kaj fruktojn, kiuj entenas sufiĉe da proteino, hidrokarbido, kalcio, fosforo kaj pluraj vitaminoj nutroriĉaj kaj facile digesteblaj, kaj fungojn, blankajn orefungojn kaj raŭpajn fungojn (*Cordyceps sinensis*), kiuj havas bonan efikon sur malaltigo de sangopremo, malpliigo de sangograsso, prevento de hepata cirozo, korstimulado kaj renofortigo. Ĝuste pro tio ili estas tre bonvenaj kaj la viandaj pladoj estas nekompareblaj kun ili.

\* 24-jara f-ino Clăudia Rupprecht, Schellingstr. 73, D-8000 München 40, F.R. Germanio, dez. kor.

\* 15-jara knabo dez. kor. kun gejunuloj pri diversaj interesoj, precipe ornitologio, sporto kaj muziko. Magnus Sandelin, Södra Stommen 112, S-43800 Landvetter, Svedio.

\* 28-jara inĝeniero dez. kor. kun esp-istoj, ĉefe germanaj, italaj

kaj aŭstraj pri ĉiuj temoj, F-o Luiz Grasso -C.P. 11.147 Sao Paulo S P -Brazilo.

\* Korespondos Afrike kaj Azie, Fulvio Scarpa, Fondo Versace 3 Tr. N. 24. 89100 Reggio Calabria, Italio.

\* Mi (21-j) dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj. Manoochehr-Zeynali, P.O. Box 5715, Tehran 11365, Irano.

\* Maria Jagiello-Dangow kaj ŝia 19-jara filino Maja Dangow, studentino de universitato, dez. kor. kun ĉiuj ges-anoj pri ĉio, 44-100 gliwice u, Styczynskiego NR. 37M. 6, Pollando.





## DU ĜENAJ VORTOJ

de DONALD J. HARLOW (Usono)

En la artikolo "Antaŭen Strebantaj Junuloj de Ĉinio" verkita de Ĝang Ĉingĝen, sur paĝo 25, mi trafis du vortojn, kiuj iom ĝenis min. La unua estis la vorto **komputero**. Certe tiu vorto ja troviĝas en PIV; sed ŝajnas al mi, ke jam delonge la esperantista legantaro montris sian preferon por la pli esperanteca **komputilo**. Tiun lastan uzis la Komputilteknika Terminaro en Kvin Lingvoj de Münnich jam antaŭ eble 13 jaroj; kaj la radiko **komput-** estas uzata en la titolo de la revuo "Internacia Komputado". En la antaŭparolo al la nova "Komputada Baza Terminaro", Kalckhoff kaj Pick rimarkigas, ke...

... La komence enkondukita

de ni termino "komputero", kvankam ĝi troviĝas en PIV, ne estis akceptata de granda plimulto de fakuloj. Antaŭ nelonge farita enketo konfirmis nian observon. Nekonforme al PIV kaj senkonsidere, ke PIV donas al "komputi" kaj sekve al "komputilo" tute alian signifon, la plimulto voĉdonis por tiu ĉi termino, postulinte, ke la radikvorto "komputi" estu denove difinota. Do por gardi la principon de la lingva unueco, ni forĵetis la terminon "komputero", anstataŭigis ĝin per "komputilo" kaj ŝanĝis la difinon por "komputi". (Citita en "Budapeŝta Informilo", Majo, 1985)

La alia vorto estas **navigacio**. Tiu vorto estas eĉ pli neargumen-

tebla ol **komputero**, ĉar nek **komputi** nek **komputero** estas oficialaj, sed **navigacio** ja estas. Tamen nuntempe oni uzas la radikon **navigi** kaj pere de ĝi la terminon **navigado** (kiu eĉ estas uzita por difini **navigacio** en PIV); do ŝajnas al mi, ke **navigacio** estas efektive arkaismo.

Oni devas esti tre singarda, uzante la Zamenhofajn radikojn, kiuj finiĝas per **-cio** (devenintaj de latinaj substantivoj de la tria deklinacio), ĉar en la nuna tempo la esperantistoj ofte preferas formojn kunmetitajn el pli simplaj verbaj radikoj, ekz. **aboli** anstataŭ **abolicio**, **federi** anstataŭ **federacio**, **administri** anstataŭ **administracio**, **navigi** anstataŭ **navigacio**, aŭ laŭ propono de J. Valano en unu sia romano, **intui** anstataŭ **intuicio**. Foje oni ne nur per tia uzado kreas pli netan esperantan terminon, sed ankaŭ solvas ian dubsencaĵon de la originalo (mi neniam komprenis, ekzemple, ĉu **administracio** estas **administrado**, **administrantaro**, aŭ simple **administrato** — sed eble en tio min trompas mia propra lingvo, en kiu **administration** povas signifi ĉiun el la tri. . .).

## Trikolore glazurita leono

de ĜŬO JOŬMIN

La trikolore glazurita leono farita en Tang-dinastio (618-907) estis elterigita en 1955 en Ŝjian, Ĉinio. La leono kun alto de 19.5 cm. havas brilajn kolorojn kaj versimilecon.

La tri glazuraj koloroj estas propraj al la Tang-dinastiaj ceramikaj kaj terakotaj homfiguroj. Fakte oni uzas, krom blanko, ankaŭ helan flavon, helan verdon, malhelan flavon, malhelan ver-

don kaj bluan. La trikolore glazuritaj ceramikaĵoj kaj terakotaj homfiguroj furoris en la komenco de Tang-dinastio.



*Trikolore glazurita leono*



8719 10

